

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*

Bjalistoko: la kultura  
programo

La nova prezidento de  
Litovio kaj Esperanto

Esperanto-Tagoj en  
Barcelono

Tra Esperantujo

La galega lingvo en  
danĝero

Ekonomia potenco de  
lingvoj: la angla  
superas sed kiuj estas  
sekvaj?

Rememoroj de Petro  
Stojan

Nia trezoro: *Esperanto*



MGJfoto

2009

5-6

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2009. №5-6 (175-176)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Tatjana Auderskaja, Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2009**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 450 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldon:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara kajero.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 650 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (3000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1800 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (1000 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (600 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2009.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2009, №5-6 (175-176).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 25 мая 2009 г.

Цена свободная. Тираж: 650 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

**U**nu hektaro bezonas unu uzbekon! — Tiun formulon de agrikultura bonstato mi aŭdis surprize de farma neofito. La serioza, preterpasa kaj certa tono de tiu aserto ne lasis lokon por dubo: ĝi ne estis revelacio de mia kunparolanto, li simple ripetis banalaĵon de komuna uzo. *Unu uzbeko por unu hektaro* estis baza nocio de kalkulo pri la racia agrikultura ekonomio, kaj kiel alfabeto vero ĝi neniom bezonis diskuton. Dek kvar uzbekoj por mia modesta persono — ĉar mi posedas dek kvar hektarojn — konsistigas la fundamenton de mia ekonomia prospero. Iom da milionoj da gastlaboristoj por nia rusbalta inkludo sufiĉas por solvi niajn regionajn problemojn.

Ja ni bezonas gastlaboristojn, — sendispute, sendebate, senbrue, senhezite tiu ideo iĝis aksiomo de nia socia konscio. Ne la manko de la loĝantaro nutris tiun paradoksan opinionon. Amasoj de senlaboraj indiĝenoj tute vaporigas ĉiun suspekton pri iu malsufiĉo. La racia motivo sin apogas sur rezonoj pri la kosto de la laborforto. La socia opinio salutas tiun klarigon de la enmigra ŝtatpolitiko, kaj oni povas nur miri pri la unuanimeco, kiu ligas la plene klaran intereson de la entreprenistoj (tre minoritataj en la komuna maso de la civitanoj) kun la tute svaĝaj reprezentoj de la labora-senlabora parto de la popolo. La miro kreskas, se oni konsideras, ke la sama plejmulto ĉiom trankvile rilatas al la planoj de la evakuo de la loĝantaro de nordorientaj regionoj — laŭ la motivoj de tro alta kosto de ilia civiliza infrastrukturo.

— Ni bezonas labormanojn por evoluigi la landon, — deklaras la ŝtatviroj.

— Ni ne havas laborlokojn pro la krizo, — aldonas ili, speciale por la kuncivitanoj. Kaj vane oni serĉus voĉon el opozicio, kiu atakus tian logikan malkoincidon.

Strange aŭ inverse (tre laŭrange), socialistoj, komunistoj kaj demokratoj kongruas en la punkto absolute liberala: laŭ la kriterioj de la ekonomio la indiĝena loĝantaro malutilas al la disvolvo de la teritorio. Nuancoj ne gravas. La socialistoj insistas pri filantropio, la komunistoj postulas respekton del nacia fiereco, la demokratoj lamentas pri kresko de la ksenofobio.

Kaj la ksenofobio, vere, kreskas. Spite al la koscia abstrakta trankvilo de la publiko koncerne la alvenon kaj ĉeeston de la gastoj (“Ja ili laboras por ni kvazaŭ senpage!”) la subkonscia konkreta irito kaj kolero serĉas eliron en aktoj agresaj, plejparte senmotivaj. Litovoj, moldavoj, belorusoj sukcesas miksiĝi kun la amaso. Sed la uzbekoj! Ili ŝajnas invadi la areon. Bronzehaŭtaj nigreharaj viroj videblas marrande kaj profunde de vilaĝoj. Kontraŭ bonaj atendoj ili ne estas turistoj. Ili fosas grundon, ebenigas terenojn, miksas betonon, glatigas asfaltan. Tie ili masonas la vilaon por novruso, ĉi tie — perlaboras ties bienkampon. Dimanĉe iuj ripozas: sinordigas modeste — korpe kaj veste — en kaj ĉirkaŭ siaj furgonoj-vagonetoj, kaj — per grupoj, sen troa bruo — promenas laŭstrate. Iliaj familioj atendas ilin kaj ilian necertan monon ie sude, tre malproksime. Iam ili revenos hejmen, al siaj edzinoj kaj sunoplenaj ĝardenetoj, anstataŭigitaj de siaj najbaroj, nevoj kaj filoj.

La orfoj de du teroj, ili glitas preter ni en sia propra paralela dimension, kaj ni, orfoj de nia grundo, rigardas ilin kvazaŭ trans vitro.

Tia estas la nova tergloba mondo. La patrioj ne bezonas plu sian infanaron. La kapitalo bezonas cirkuladon de la laborforto. Kaj la homaro bezonas la kapitalon. Ĉar, kiel diris Karl Marx, por la disvolvo de la produktado la historio rajtas oferi ne nur unuopulojn, sed ja tutajn klasojn kaj popoltavolojn.

*Alen Kris*

**Sur la kovrilpaĝo** estas dancistino el *Fair Play Crew*, kiun vi vidos ĉi-julie en Bjalistoko. (*Fotis Marek Gainski*)

# Bjalistoko: la kultura programo

Chanajki Band (Fotis Rafal Grabowski)



Mi ŝatas la momenton, kiam plena de scivolo, post la ricevo de la kongresaj dokumentoj, mi unufoje malfermas la kongresan libron por elekti interesajn punktojn de la programo. De tempo al tempo mi nervoziĝas kiam mi devas forstrekii interesan prelegon aŭ prezentadon por elekti alian, same por mi interesan, kaj pro tio mi jam antaŭvidas mienojn de kelkaj samideanoj volantaj spekti absolute ĉion.

La Bjalistoka Esperanto-Societo aranĝis la unuan devigan selektadon jam de la momento, kiam UEA anoncis, ke BES estos ĝia ĉefa kunlaboranto por la Kongreso.

Kontaktis nin “multaj konataj vizaĝoj”, sed aŭdinte, ke la kongresa buĝeto ankoraŭ ne ekzistas, ili malaperis. Restis la plej fidelaj: *Asorti*, *JoMo*, *Ĵomart* kaj *Nataŝa*, *Georgo Handzlik*. Mi tre dankas al ili. Ili estis kiel la radikoj de la venonta programo. Sed ĉar ilin jam konas la tuta Esperanta mondo, permesu, ke nun mi rakontu pri aliaj artistoj.

Al LKK prezentis sin novaj lokaj kaj landaj entuziasmoj, pretaj krei por la kongreso ion unikan, kion vi povos spekti nur en Bjalistoko.

La urbo emfazas sian multkulturecon, do lige kun ĝi, ni prezentos al vi la ĉarman ukrainan ensemblon *Czeremyszyna*, la litovan *Dautenis*, la belorusan *Malanka*, la polan *Klekociaki*, la judan *Klezmer Chanajki Band*. Kun la loka folkloro de Podlaĥio konatigos vin la brila ensemblo *Kurpie Zielone*.

La tempon, kiam Bjalistoko estis

privata urbeto de la hetmano Jan Klemens Branicki, ĉirkaŭata de ligna palisaro kaj loĝata de palacaj servistoj kaj metiistoj, rememorigos du ensembloj ludantaj barokan muzikon: ensemblo de rektaj flutoj *Cantio Polonica* kaj ensemblo de antikva muziko *Capella Antiqua Bialostociensis*.

Venu ĝustatempe por partopreni la unuan koncerton en la Salono Zamenhof: jam sabate vespere Irena Urbańska el Krakovo omaĝe al Ludoviko kantas belegajn judajn kantojn en la versioj juda kaj esperanta.

La Bjalistoka Studio de Kanto prilaboris en Esperanto kantojn pri Bjalistoko kaj eĉ registris ilin. La lumdiskon serĉu en viaj sakoj kun la kongresa materialo. Aŭskultu, kunkantu kaj portu ĝin hejmen por prezenti al viaj familioj.

Certe ne nur junularo deziras partopreni la koncerton de *Supernova* — rokbando el Brazilo, en kiu anas Rogener Pavinski (voĉo kaj basgitaro), Leandro Souza (elektrogitaro), Roger Borges (sinteziloj) kaj Romulo Felicio (drumo). Ĝi naskigis en 2004. La unua albumo de *Supernova* estis lanĉita en oktobro 2006 de *Vinilkosmo*. “Pasio en Katen”, “Alia Mondo Eblas”, “Stela Nokto” — jen la plej konataj en la movada medio junulara ekzemploj de potenca roko kun melodiaj voĉoj, frapa gitarumado kaj vigla ritmo. La grupo iĝis populara ankaŭ pro la unua profesie realigita muzikvideo.

Ĉu vi estas preta rezigni tion por partopreni koncerton de budhaj monaĥoj en la filharmonio?

Ĉiutaga demando, kion elekti: ĉu kongresan balon, ĉu la koncerton de Bjalistoka Filharmonio sur la Urba Placo kaj kunkantadon de la *Odo al ĝojo* en Esperanto? Ho... okazos veraj dilemoj!

Dum la kvar unuaj kongresaj tagoj en Bjalistoko daŭros Festivalo de kulturoj. Urbocentre, sur la granda scenejo, apud *Café Esperanto*, kie iam la eta Ludoviko Zamenhof vagadis inter ĉevalĉaroj, prezentos sin kvardek ensembloj el la mondo. Multkultureco venos ĉi-foje Bjalistokon.

Ĉu vi scias, ke mia urbo estas fama pro bonegaj dancistoj? Niaj francaj Esperanto-amikoj el Saint Aubine de Luigne antaŭ kelkaj jaroj invitis bjalistokanojn por “ornami” la feston de ĝemelaj urboj. Venis la infana dancgrupo *Plas* kaj la popoldancgrupo *Malanka*. Krom oficialaj koncertoj ĉiuvespere sur la kampadejo, kie ni loĝis, la grupoj koncertis por propra plezuro. Jam la duan vesperon la kampadejo estis plenplena de loĝantoj de la najbara urbeto. Mi esperas, ke ili same plaĉos al la kongresanoj. Nuntempajn junularajn dancstilojn montros gejunuloj el la ensemblo *Fair Play Crew* kaj *DanceOffnia*. Ili estas niaj “eksportvaroj”, pri kiuj ni estas fieraj.

Dum kvar tagoj funkcios literatura kafejo FAMA. Sur ĝia scenejo koncertos bardoj kun kaj sen barboj.

Kompreneble ne mankos teatraĵoj. Imagu, ke iutage, dum la vespermanĝo en vian loĝejon eniras oficistoj kaj informas vin, ke de hodiaŭ landa limo iras tra la mezo de via manĝoĉambro, eĉ

Vd. p. 4



Budhaj monaĥoj (Fotis Marcin Szarkowski)





tra la mezo de via manĝotablo! Rusoj dirus: situacio kiel en la komedio de Gogol, poloj — kiel ĉe Sławomir Mrożek.

Enirbiletojn por la spektakloj *Domo ĉe limo* en la dramteatro kaj *Fasada ĉe la Pupteatro* vi ricevos jam sabate en la informejo. Rapidu, ĉar la kvanto da lokoj estas limigita. Ne perdu la eblecon!

Sur la granda scenejo en la salono *Zamenhof* vi spektos unuaktoran dramon pri juna Ludoviko, teatraĵon *Terminus a Quo* kun japana prezento de *Kanoj* kaj la Junularan Kulturdomon kun la muzika prezento de la *Bjalistoka Babelturo*. Ni ne povas kontesti ke ĝi estas mirakle retrovita teatraĵo de la 10-jara Ludoviko Zamenhof!

Vi havos ŝancon admiri la kabaredon de Saša Pilipoviĉ *10 tagoj el la vivo de kapitano Postnikov*, kie kunludos serbaj aktoroj, Mikael Bronŝtejn kaj Elena Puĥova. En la kafejo *FAMA* planas prezenti sin la kabaredo *Lumbago*.

Studentoj kaj instruistoj el la Muzika Universitato proponos multmedian

*Terminus a Quo* (Fotis Edward Gramont)



prezentadon *Bjalistoko en nuksa ŝelo. De baroko ĝis hodiaŭ!*

Sciante, ke pro diversaj kialoj ne ĉiuj dancas, ni decidis organizi la kongresan balon en aliaj kondiĉoj. En la salono *Zamenhof* estos speciala spaco por dancantoj, sed ankaŭ restos sidlokoj por tiuj, kiuj nur spektos kaj admiros la artistojn kaj dancantojn. Koncertos la popolensemblo *Czeremszyna*, japana muzikisto Leo Sakaguĉi kaj fine vi aŭskultos klasikan muzikon de *Andreas Band*. Laculoj povos refreŝigi sin en la najbara gastronomia tendego.

Ĉu vi aŭdis pri franca fotisto Yann Arthus-Bertrand, kies hobbio estis foti la teron el la ĉielo? Ĝuste sub la titolo *Tero el la ĉielo* ni komune malfermos en la urbocentro ekspoziciegon, kiun ĝis nun spektis pli ol 120 milionoj da homoj en la mondo. Reprezentantoj de 61 landoj, partoprenantaj la 94an UK-on, starigos samtempe siajn piedojn sur grandega mapo de la mondo en la loko, kie situas iliaj hejmlandoj. Vi bezonos multe da tempo por trarigardi la tutan ekspozicion.

Kiu el vi havis jam ŝancon spekti la konstruadon de “mandalo” fare de budhaj monaĥoj? Ili venos speciale al Bjalistoko el Tibeto por montri tion al la kongresanoj kaj bjalistokanoj.

La plej fama paro de polaj vojaĝantoj: Elżbieta Dzikowska kaj ne plu vivanta Tony Halik kolektis materialon por la ekspozicio pri siaj vojaĝoj. Ĝi estas tre impona kaj speciale por vi alvenos Bjalistokon. Sur grandaj bildoj vi vidos mirindajn aspektojn de lokoj kiujn vi plej probable neniam persone vizitos, kaj pri kiuj vi nur povus revii.

Kaj ĉu vi ankoraŭ trovis iomete da tempo por akcepti la inviton de la Fondaĵo de princo Ostrogski kaj spekti en la Palaca Ĝardeno de Branicki ekspozicion pri Bjalistoko?

Ĉiu esperantisto certe legis, aŭ provis legi, *Sinjoron Tadeon* — la faman

poemon de Adam Mickiewicz, tradukitan de Antoni Grabowski. La varsovia ĵurnalisto Roman Dobrzyński proponis esperantigi filmojn kaj montri ĝin dum la Kongreso. Nia ĉefa argumento dum longaj interkonsentaj traktadoj kun la reĝisoro kaj la filmproduktanto estis, ke koreo aŭ usonano neniam imagos la ĉirkaŭaĵojn kaj etoson de la epoko, en kiu okazas la intrigo. Danke al nia insistemo kaj la financa subteno de la urbestro de Bjalistoko ni sukcesis. Venu nepre al la salono *Zamenhof* por ĝui la etoson! Antaŭ la projekciado Roman Dobrzyński mallonge prelegos por faciligi la komprenon de la filmo.

Kaj, kiam vi jam estos spektinta ĉion supre priskribitan, restos ankoraŭ speciala montrado de modoj, surstrata teatra parado *Kto*, lirikeca malnova filmo kun akompananta pianludo, kie sur ekrano “li amas ŝin kaj mortas por ŝi. Ni kredas ĉar ankaŭ ni estas enamiĝintaj...”, parado de malnovaj aŭtomobiloj kaj liberaera koncerto de *Night Compt Blues*.

Amantoj de klasika muziko havos ŝancon partopreni koncerton en la romkatolika baziliko aŭ aŭskulti koruson en la ortodoksa katedralo.

Por gastoj dum la festa bankedo ludos kaj kantos aktoroj de la Pupteatro.

La konstruentrepreno, kiu rekonstruas la domon por la venonta Zamenhof-Centro daŭre deklaras, ke ĝi estos ĝustatempe preta. Tio signifas, ke la kongresaj gastoj havos okazon spekti la plej modernan en la tuta Pollando multmedian ekspozicion pri la juna Ludoviko. Aldone ni preparas unuajn portempajn ekspoziciojn de Esperantofilatelajoj, ekslibrisoj, punktoj kaj poŝtkartoj.

Invitas vin muzeoj kaj galerioj. La Medicina Universitato preparas grandan ekspozicion pri kuracistoj en la familio Zamenhof. La galerio *Montparnasse* planas surstratan prezenton de modo de diversaj jarcentoj.

Iutage en la parko Planty, ĉe lumfontanoj en la Aleo de Enamiĝintoj vespere koncertos por bjalistokanoj kaj por la kongresanoj JoMo. Certe li kantos nur pri amo.

Multajn diversajn kulturajn programerojn la organizantoj antaŭvidis en lokoj atingeblaj por urbanoj kaj la kongresanoj. Estos okazo por konatiĝi.

Se mankos al vi tempo por ĉio dum la Kongreso — revenu ankoraŭfoje kun via familio. La gastama Bjalistoko atendos vin!

**Ela Karczewska**

## UEA en 2008: perdoj kaj kreskoj

Laŭ *Gazetaraj Komunikoj de UEA* en 2008 UEA registris la plej malgrandan nombron de individuaj membroj (IM) post la Dua Mondmilito: 5702, t.e. je 11 malpli ol la antaŭa malrekordo el 2002 kaj je 309 malpli ol en 2007. Kiel atendite, la plej granda falo okazis en Japanio, kiu pro la Jokohama UK estis la plej granda lando laŭ la nombro de IM en 2007, entute 856, sed en 2008 ĝi falis al 402. La perdo en Japanio estis do 454. Ĉar la tuta perdo estis 309, la cetera mondo kompensis unu trionon de perdo en Japanio. Francio rekonkeris la unuan lokon kun 583 IM (+35); la dua estis Germanio kun 534 IM (+20). Unu el kvin IM de UEA estis en tiuj du landoj.

La tuta membraro de UEA tamen kreskis per 706, ĉar la aligitaj membroj (AM) plimultiĝis el 11477 al 12492, dank' al Hungario, kiu en 2007 pagis por 100 AM, sed en 2008 por 1348. (AM estas tiuj anoj de la landaj asocioj, kiuj ne estas IM de UEA.). Hungario liveris sume 1461 membrojn kaj estis la lando kun plej multe da UEA-anoj.

La unua landodeko de UEA en 2008:

Lando	AM	IM	Sume
Hungario	1348	113	1461
Germanio	832	534	1366
Ĉinio	1051	113	1164
Francio	553	583	1136
Japanio	677	402	1079
Italio	777	208	985
Brazilo	318	337	655
Usono	341	314	655
Belgio	480	159	639
Pollando	500	120	620

Eble por nombroŝatantoj estas interese scii, ke la landoj de eksa Sovetunio (13 landoj, escepte de Azerbajĝano kaj Turkmenio, kie neniu membras en UEA) estas 981 membroj de UEA (574 AM + 407 IM), kaj en la eksjugoslavaj landoj (neniu en Kosovo kaj Montenegro) — 717 (553 AM + 164 IM).

Positiva estis la kresko de Societo Zamenhof al 166 anoj (+39). Revuo *Esperanto* havis 3860 pagitajn abonojn (-157) kaj *Kontakto* 845 (+100).

Jen la evoluo en la lastaj jardekoj:

Jaro	IM	AM	Sume
1948	6.120	11.587	17.707
1958	6.813	18.106	24.919
1968	7.107	25.273	32.380
1978	6.215	24.828	31.043
1988	7.203	35.945	43.148
1998	7.360	12.812	20.172
2008	5.702	12.492	18.194

AIKO

## Esperanto en ALTE-Konferenco

Petra Smidéliusz, universitate kvalifikita specialisto pri testado de lingvokonoj kaj kunlaboranto de Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, estis reprezentanto de UEA en la 36a konferenco de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE), kiu okazis 22–24 apr 2009 en Santiago de Compostela (Hispanio).

Akorde kun la celoj de la komisiono de UEA pri la ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), laŭ kiuj oni planas ellabori kaj akreditigi ĉe ALTE ekzamen sistemon por infanoj-junuloj — ankaŭ por helpi la kunlaboron inter lernejoj, ekzemple, kadre de la projekto *Lingvolanĉilo* — Smidéliusz partoprenis en la laborgrupoj pri normigo de ekzamenoj por junaj gelernantoj. En ili oni interŝanĝis ideojn kiel igi la ekzamenojn infan-amikaj kaj la koncernajn dokumentojn, ekzemple, *Manual for relating Language Examinations*, infanspecifaj.

La konferenco estis konsiderata ankaŭ lingvopolitike grava evento. Alparolis ĝin Leonard Orban, EU-komisionano pri multlingvismo, kiu emfazis, ke la lingvolernado de eŭropaj infanoj havas grandan gravecon kaj sekve tre gravas la evoluigo de iliaj lertecoj kaj kompetentoj.

La fakto, ke por EU multlingvismo estas celata trajto de eŭropanoj, ne malhelpis al Petra Smidéliusz ekinteresi plurajn lingvistojn kaj kolegojn pri Esperanto kaj fiere raporti pri niaj eksperimentoj, internaciaj spertinterŝanĝoj kaj interkulturaj edukebloj. La ekzisto de komuna lingvo, al ĉiu relative facile lernebla, ne montriĝis kontraŭa al multlingvismo, sed pluraj vidis en ĝi realan kaj atingeblan rimedon por ties efektivigo.

GK UEA

Laŭ HeKo, la konferencon de ALTE partoprenis ankaŭ delegacio de Kultura Centro Esperantista: gec-anoj Elisabeth Amstad kaj Giorgio Silfer. La unua sekvis la laborgrupon pri junaj gelernantoj, la dua okupiĝis pri la migrantoj kaj pri la apliko de KER, kiu estas konceptita por adoltoj.

**Sur la foto:** John Sawyers (ambasadoro de Britio), Ban Ki-mun (Ĝenerala Sekretario de UN), Neil Blonstein (reprezentanto de UEA ĉe UN).



## Ĉefministra saluto

La ĉefministro de Malsupra Saksujo, Christian Wulff, sendis al la partoprenantoj de la Eŭropa kaj Germana Esperanto-Kongresoj, kiuj okazos 28 maj – 3 jun en Herzberg am Harz, salutmesaĝon, en kiu li, interalie, skribis:

“Lingvo ligas, ebligas komunikadon trans limojn. <...> La Esperanto-movado ekde multaj jardekoj tute dediĉas sin al la tasko, evoluigi komunan lingvon, servi la interkomprenadon inter la popoloj kaj per tio la pacon. <...> Ke via interŝanĝo kontribuu al multforma Eŭropo, kiu estu konscia pri siaj radikoj kaj komune konstruu la estontecon”.

Thomas Sandner

## Diplomatoj ne nur kunsidas

26 apr okazis en Nova Jorko piedpilkamato, organizita de ĉiliaj kaj lihtenŝtejnaj diplomatoj, en kiu partoprenis Ban Ki-mun, Ĝenerala Sekretario de UN kaj multaj aliaj ambasadoroj.

La publiko konsistis el centoj da familianoj kaj amikoj de la diplomatoj kaj reprezentantoj de NeRegistraj Organizaĵoj. Inter ĉi tiuj estis Neil Blonstein, reprezentanto de UEA ĉe UN en Nova Jorko, kiu profitis la okazon por alparoli pri Esperanto multajn, inkluzive de la Ĝenerala Sekretario de UN. NB







## La nova prezidento kaj Esperanto

la 17an de majo per grandega plejmulto da voĉoj (pli ol 68%) kiel la nova prezidento de Litovio estis elektita 53-jara Dalia Grybauskaitė — membro de la Eŭropa Komisiono (EK) pri financaj programoj kaj buĝeto.

Antaŭ ol fariĝi membro de EK (en 2004) ŝi okupis gravajn postenojn en la registaro de Litovio. Pri ŝia rilato al Esperanto afable konsentis respondi la prezidanto de la Litova Esperanto-Asocio (LEA), Povilas Jegorovas, kiu havis kun ŝi tri kontaktojn pro Esperanto.

La unua kontakto estis komence de januaro 2001, kiam ŝi estis vicministro pri eksterlandaj aferoj kaj prezidanto de itala-litova fondaĵo. Tiam LEA petis monon de tiu fondaĵo por eldoni du tradukojn el la itala: *La serĉado de perfekta lingvo en Eŭropa kulturo* de Umberto Eco kaj *Unu voĉo por la tuta mondo* (romano pri Zamenhof) de Vitaliano Lamberti. “Ŝi invitis min kaj interesiĝis pli detale pri la projekto kaj pri eblecoj de ĝia bonkvalita efektivigo, — rakontas Jegorovas. — Post kelkaj tagoj aperis ŝia decido doni al nia asocio por tiu projekto 27262,50 USD. Estas interese, ke ĝi estis la sola *kultura projekto*, kiun financis tiu fondaĵo, ĉiuj aliaj estis teknikaj, medicinaj k.s.” La subvencio sufiĉis por eldoni la du librojn kaj ankaŭ lernolibron de Esperanto de Antanas Mekys.

“Duafoje ni kontaktiĝis en printempo 2003, kiam komenciĝis preparlaboroj por la 90a Universala Kongreso de Esperanto, — daŭrigas la prezidanto de LEA. — Tiam Dalia Grybauskaitė estis ministro de financoj de Litovio. Litova Esperanto-Asocio tiam petis de la litovia registaro monon por komencaj preparlaboroj. La financa ministerio, kiun ŝi gvidis, subtenis nian peton, kaj la

registaro en majo asignis al LEA 50 mil lidojn por komencaj organizaj aferoj”.

“La tria fojo estis en 2005 antaŭ la 90a UK en Vilno, — fine diras Jegorovas, kiu estis la ĉeforganizanto de tiu sukcesa kongreso. — Mi proponis al ŝi iĝi membro de la Honora Komitato de la Kongreso. Tiam ŝi jam laboris en EK. Ŝi volonte konsentis kaj skribe konfirmis la konsenton”.

Tio klare montras la pozitivan rilaton al Esperanto de Dalia Grybauskaitė, kiu, interalie, parolas (vere *parolas*) litove, ruse, pole, angle kaj france.



## Feliĉan Paskon!

La 12an de aprilo, je la romkatolika Pasko, post sia tradicia mesaĝo “Urbi et Orbi” en la placo Sankta Petro, Papo Benedikto la 16a diris bondeziron en 63 lingvoj. En Esperanto li diris: “Feliĉan Paskon en Kristo Resurektinta!”

La bondeziron en Esperanto akceptis ĝojoplena kriego de esperantistoj, kiuj ĉeestis en la placo Sankta Petro por la dek-sesa sinsekva fojo.

La paneloj, kiuj konsistigis la vorton *Esperanto*, aperis dufoje en la monda televida elsendo, ankaŭ dum la bondezirono mem en Esperanto.

Laŭ [www.ikue.org](http://www.ikue.org)

7. Juni 2009  
Europawahl

**EDE**

**damit Europa**

**sich versteht !**

Europa - Demokratie - Esperanto (EDE) e.V.

[www.e-d-e.eu](http://www.e-d-e.eu)

## “Esperanto” 64 milionojn da fojoj

Laŭ decido de la balota komisiono de la 10a de aprilo 2009, la germana sekcio de la politika movado *Eŭropo — Demokratio — Esperanto* (EDE) rajtas partopreni en la Eŭropaj Balotoj 2009 en Germanio. Tio signifas, ke ĝis la komenco de junio la germana ŝtato presigos almenaŭ 64 milionojn da balotiloj, sur kiuj troviĝas ĝia nomo. Ankaŭ la nomoj de la dek kandidatoj de EDE-Germanio — kun prof. d-ro Reinhard Selten sur la unua loko — troviĝos sur ĉiu voĉdonilo.

EDE starigas listojn ankaŭ en ĉiuj regionoj de Francio, tiel ke entute ĉ. 108 milionoj da eŭropanoj (64 milionoj en Germanio kaj 44 milionoj en Francio) havos la eblecon subteni la disvastigon de Esperanto per sia voĉo. Dum en Germanio ĉiu voĉdonanto aŭtomate trovos EDE sur la balotilo, en Francio oni bezonos specialan voĉdonilon. EDE planas presigi kaj disdoni 7 milionojn da ili, kaj krome oni ofertas la eblecon elŝuti ilin el interreto.

En Germanio entute 32 partioj kaj politikaj asocioj partoprenos la balotojn — pli ol iam ajn antaŭe. Jam nun ĵurnalistoj publikigis la opinion, ke tiu ĉi abundo povus instigi la grandajn partiojn akcepti ideojn de la novaj politikaj movadoj. Tiel ankaŭ EDE esperas, ke ĝia baza ideo, plibonigi la kompreniĝon pere de Esperanto kaj tiamaniere akceli lingvan egalrajtecon kaj demokration sur eŭropa nivelo, ekhavas novajn impulsojn.

Pro la partopreno en la balotoj, EDE povos senpage elsendi varbajn filmetojn en la germana kaj franca televido. Krome oni klopodas multe informi ekzemple pere de afiŝoj, faldfolioj, informstandoj kaj gazetaraj komunikoj. Eĉ se (pro la neceso superi la 5-procentan sojlon en Germanio kaj Francio) la akiro de seĝo en la parlamento ne ŝajnas esti realisma, nun milionoj da homoj ekscios pri la ekzisto de Esperanto, tiel ke certe ankaŭ la ĝenerala Esperanto-movado profitos de la balotoj.

Laŭ realisma takso, EDE povos atingi en Germanio kaj Francio sume ĉirkaŭ 100 mil voĉojn. Jam tia nombro certe pli impresus la eksteran mondon ol la membronombro de la diversaj Esperanto-asocioj en Eŭropo.

La eŭropaj balotoj do povas grave helpi en tio, ke oni prenos la Esperantomovadon pli serioze.

**Ulrich Matthias**  
vicprezidanto de EDE-Germanio

## Esperanto-Tagoj en Barcelono

En la kolektiva memoro de barcelonanoj kuŝas la okazintaĵoj de antaŭ cent jaroj, nome: la Tragika Semajno. Julie de 1909 okazis en Barcelono popola ribelo okaziginta fortajn tumultojn, el kiuj rezultis 78 mortintoj (75 civilaj kaj 3 militistaj), duonmilo da vunditoj, 112 bruligitaj konstruaĵoj (el kiuj 80 religiaj), kelkaj miloj da torturitaj arestitoj, 175 kondamnitaj al ekzilo, 59 dumvivaj enkarcerigitaj kaj kvin kondamnitaj al mortopuno, inter kiuj Francesc Ferrer i Guàrdia, fondinto de moderna pedagogia instruado, arestita survoje al la 5a Universala Kongreso de Esperanto kaj ekzekutita kelkajn tagojn post ĝi.

En la kolektiva memoro de katalunoj Esperanto ludas gravan rolon. Antaŭ cent jaroj Esperanto estis idealo sekvata de plimulto de la loĝantaro. Katalunistoj, suverenistoj, laboristoj, sindikatanoj, anarkiistoj, marksistoj, kleruloj kaj pluraj diversspecaj kolektivoj aliĝis al esperantismo. En 1904 aperas la ĝermo de la Kataluna Esperantista Federacio, en tempo kiam la internacia lingvo plene ĉeestis la socian vivon de la lando. Malgraŭ la tragediataj tumultoj, septembre Barcelono sukcese gastigis la 5an Universalan Kongreson de Esperanto. La okazigo de la kongreso kaj la vizito de d-ro Zamenhof al la kataluna ĉefurbo ne temis pri simpla renkontiĝo de tutmondaj esperantistoj sed pri grava paĝo en la historio de Barcelono.

Okaze de la centjariĝo de la 5a UK Kataluna Esperanto-Asocio eldonis la libron de Francesc Poblet i Feijoo *La Universala Kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono. La firmigo de la Esperanto-movado en la Kataluna Landaro*. Ministro pri lingva politiko de la kataluna registaro verkis la antaŭparolon de la dulingva verko (en la kataluna kaj en Esperanto).

Memore al la okazintaĵoj KEA organizis kelkajn aranĝojn por kunfesti, kun la civitanaro, la eventon.

Nia stando en la Rambla (Fot. Lluís Aragay)



Barcelono: Malofte esperantistoj kunvenas en tiaj salonoj (Fotis Lluís Aragay)

La 23an de aprilo, la tagon de Sankta Georgo, dum la festo de la libro kaj la amo, esperantistoj starigis sian budon en la Rambla de Barcelono, kaj tiel kunlaboris al magia, festa, kultura kaj amato de la tago. Krom proponi librojn pri lingva ekologio, interlingvistiko, lingvaj rajtoj kaj Esperanto, la budo inaŭguris la printempajn Esperanto-tagojn en Barcelono.

Centre Artesà Tradicionàrius (CAT) estas centro pri popolmuziko enhavanta, i.a. altnivelan muzikan teatron. Ĝi konstante proponas diversspecajn festivalojn. La 24an kaj la 25an de aprilo, ĝi proponis festivalon de popolmuziko kaj Esperanto: po koncerto kaj po balo ĉiutage. La 24an de aprilo koncertis Jomo kaj *Liberecanoj* kaj *Kaj Tiel Plu* dancigis la partoprenintojn. La 25an de aprilo *Duoble Unu* proponis belegan spektaklon vidan kaj muzikan laŭ la muzikoj de la Mediteraneo, kaj sekve *Kapriol'* dancigis engaĝe danceman publikon. La alta kvalito de la festivalo surprizis la ĉeestantojn, la organizantojn kaj la amasmediojn.

La 27–29an de aprilo Kataluna Esperanto-Junularo kunvenis en la trinkejo de la muzeo pri moderna arto. Sub la celo organizi debatojn pri lingva daŭripovo, KEJ okazigis informajn kunvenojn al interesiĝantoj pri Esperanto, kaj movadanoj profitis la okazon laborkunveni.

En la nobla salono “de Cròniques” de la barcelona urbodomo estas 120 seĝoj, sed la 30an de aprilo oni devis aldoni plian kvindekonojn por akcepti ĉiujn partoprenintojn al la memora solenaĵo pri Universala Kongreso de 1909. Tie prelegis reprezentanto de la barcelona magistrato S-ro Ramon Nicolau, la prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio S-ro Llibert Puig kaj la vicprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio S-ro Pedro Hernández; s-ro Josep Franquesa,

komitatano de KEA en UEA legis la salutmesaĝon de la prezidanto de UEA Probal Dasgupta. Koruso *Santa Eulàlia* kantis la faman popolkanton *La najtingalo*. Post la solenaĵo, manĝeto estis proponata en la gotika galerio de la nobla ĉefdomo de la urbo.

La 1an de majo *Kaj Tiel Plu* dancigis de 21:30 ĝis la noktomezo sur la gotika placo del Rei. La sono estis bonega, la dancemo de la publiko estis grandega kaj la partopreno estis multnombra.

Sabate la 2an de majo, oni fermis la Esperanto-tagojn. Dani Cortijo, fakulo pri historio de Barcelono, gvidis kvindekonojn da homoj tra la stratoj de la urbo laŭ la vivo de Barcelono en 1909. La vizito finiĝis en la tombejo de Montjuïc, kie oni vizitis la tombon de Ferrer i Guàrdia kaj la amastombejon, kie kuŝas internaciaj brigadistoj batalintaj kontraŭ la faŝismo dum la hispana milito kaj kvarmilo da persekutitoj murditaj de la frankismo.

Amaskomunikiloj interesiĝis pri la festivalo. Muzika radio ICatFM elsendis tuthoran programon kun la partopreno de Mon Cardona kaj Ferriol Macip, kie aŭskulteblis muziko de la lastaj KD de JoMo, *Duoble Unu*, *Kajto* kaj *Kaj Tiel Plu*. COM Ràdio, informis pri la festivalo kaj intervjuis la sekretarion de KEA kadre de la posttagmezaj novaĵoj kaj proponoj por barcelonumi. Ràdio 4, kataluna branĉo de hispana ŝtata radio, elsendis duonhoran programon pri la festivalo kun la intervenoj de Floreal Martorell kaj Ferriol Macip.

*Barcelona TV*, post informi pri la 5a UK kaj la solenaĵo en la urbodomo, elsendis kvaronhoran intervjuon al la aktivulo de Kataluna Esperanto-Junularo, Roger Sanjaume, kadre de la vesperaj novaĵoj. Sanjaume reliefigis la rolon de esperantismo en la aktualaj sociaj movadoj.

**Ferriol Macip i Bonet**





## Impreso de unuafoja partopreninto

25a Printempa Seminario Internacia okazis 10–17 apr en St. Andreasberg (Harcmontaro). Estas kiel unua labor-tago en nova laborloko, kiam oni partoprenas la unuan fojon en Esperanto-renkontiĝo. Tute nova mondo kun specifa homo-tipo, iom fremda cirkonstanco, miksaĵo inter ĝojo pro novkomenco kaj malcerteco pri la estonteco.

Tiel mi sentis, kiam mi unuafoje partoprenis Esperanto-renkontiĝon, — la Internacian Seminarion en Cuxhaven dum jarŝanĝo 2000/2001. Kaj same mi sentis min ĉi-jare, kiam mi trempiĝis en la mondon de la plenkreskulaj renkontiĝoj. Mi estas preskaŭ 27-jara, do bona tempo por eniri novan mondon, ĉu ne? Jam la alvojaĝo sentigis min alveni en alia mondo. Kiam mi eniris la buson al St. Andreasberg en la stacio de Herzberg — la Esperanto-Urbo ĉe la Harcmontaro — jam dum la busveturado mi sentis min kiel sur alia stelo. Valoj meze de grandaj pinarbaroj, rokaro kovrita de musko, malplenaj dometoj ĉe la strato, homoj sidante apud la strato...

Kiam mi venis al la Internacia Domo Sonnenberg (sunmonto), min jam memorigis multo pri Esperanto-renkontiĝo. Multaj aŭtoj kun fremdaj signoj promesis internaciecon. Mi eniris la ĉefan domon. Apud la granda salono mi aŭdis konatan voĉon: “Saluton, Andre-as!” Kaj tuj mi sentis min hejme.

La posta akceptado estis kiel en junulara renkontiĝo kaj ankaŭ la lito-disdonado estis konata proceduro. Miaj kunĉambroj estas en la ĉambro, ankaŭ ili atendas la vesperan programon: merkatema ukraino, kiu tuj prezentis al mi siajn varojn, kaj laborema hungaro, kiun mi jam vidis dum la pasintjara Internacia Junulara Kongreso en Hungario.

Dum la sekvinta vespera programo estis pupteatraĵo, kiu estis surprizo por mi, ĉar mi antaŭe ne povis imagi, ke cel-grupo de pupteatraĵo ankaŭ povas esti plenkreskuloj kaj same, ke ĝi ankaŭ estas interesa okazaĵo por mi mem. La arbara nano Hörbe montris sian mondon kaj Christoph Frank bone vivigis la figuron per siaj fingroj kaj voĉo. Nemeŝinda la salutproceduro inter amikoj miaj. Ŝajne, plenkreskulaj renkontiĝoj ne estas tute aparta mondo.

La matenmanĝo estis iom stranga situacio. En junulara renkontiĝo kutime nur kelkaj junuloj matenmanĝas. Aŭ oni nur ĵus iris dormi, aŭ oni ankoraŭ dormas por poste viziti la antaŭtagmezajn prelegojn. Dum PSI la tuta manĝejo estas plena. Familioj kun infanoj, paroj, maljunuloj, eĉ kelkaj mezjunuloj en mia aĝo sidas ĉe la tabloj kaj vigle kaj manĝante preparis sin por la tago.

La Internacia Domo Sonnenberg situas meze en la arbaro kaj havas vere belan ĉirkaŭaĵon. El ĝi oni bone povas atingi ĉiun vidindaĵon de la montaro, ekzemple, la historian trajnon al la ĉefmonto. Dum PSI ni faris kelkajn ekskursojn. Krom la ekskursoj estis multaj programoj en la domo mem. Krom temaj prelegoj estis infanaj programoj kaj prezentado de la Esperanta vivo, ekzemple: prezentado de Juan Lazaro pri la venont-jara Universala Kongreso en Kubo kaj prezentado de la baldaŭa Germana kaj Eŭropa Kongreso en Herzberg.

Vere ripetinda afero estis la jubilea balo kun dancado kaj festado. Kaj denove paraleloj: Ankaŭ la plenkreskuloj festas ĝis la noktofin’.

Dum la lasta tago komencis plui. Sed tamen, estis bona ekskurso al la mondo de plenkreskulaj Esperanto-renkontiĝoj.

Andreas Diemel

## Triobla dana jarkunveno

La lastan aprilan semajnfino okazis la jarkunveno de la Dana Esperanto-Asocio (DEA). La kleriga programo enhavis prelegojn de Zlatko Tišljar, ĝenerala sekretario de EEU, kaj de d-ro Aleksandro Melnikov.

Zlatko Tišljar prelegis pri la meritoj de Zamenhof por la vivanteco de Esperanto, kies tezo estis ke ne la kvalito de Esperanto kiel lingvo kaŭzis ties vivantecon, sed la intuicio de Zamenhof, kiu reklamis Esperanton kiel ilon por plibonigi la mondon. Lia dua prelego estis: *Al EU mankas lingvo kiu simbolas ties identecon*. D-ro Melnikov prelegis amuze pri *Ekparolu, por ke mi vin vidu, aŭ ĉu esperantisto rekoneblas laŭ paroloj?*

Siajn ĝeneralajn kunvenojn havis DEA, ties junulara sekcio DEJO kaj la landa sekcio de ILEI. Ileana Schröder estis reelektita kiel la prezidanto de DEA, Regin Larsen novelektiĝis kiel la prezidanto de DEJO kaj Bent Jensenius kiel la sekciestro de la dana ILEI-sekcio.

Dum la distra vespero muzikis la danaj fratoj Jonas kaj Mathias Dalmose.

Ileana Schröder

## La Mezorianta Kunveno denove

3–6 apr okazis en Turkujo la dua Mezorianta Kunveno, organizata de la Komisiono de UEA pri Agado en landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko, en la urbo Iznik, du horojn sude de Istanbul.

La mezoriantaj kunvenoj estas ĉefe por homoj loĝantaj en la regiono, sed ili invitas ankaŭ homojn el aliaj mondopartoj. La unua kunveno okazis en Amano (Jordanio) la pasintan jaron kun proksimume 25 partoprenantoj el sep landoj. La duan kunvenon partoprenis proksimume 40 el 17 landoj. Krom la mezoriantanoj (el Irano, Turkujo kaj Israelo) estis multaj eŭropanoj, unu usonanino kaj du koreoj. La programo konsistis el prelegoj pri la Esperanto-movado en Irano, Turkujo kaj Israelo kaj pri fakaj temoj (Davide Astori el Italujo prelegis pri stereotipaj ideoj pri la turkoj).

La vesperaj programoj konsistis el koncerto de Georgo Handzlik, kaj kabareda spektaklo de Saša Pilipoviĉ el Beograd.

Abundis ekskursoj al Iznik, al la ĉirkaŭaj lagoj kaj al Bursa. Ĉiuj ankaŭ antaŭkongresis aŭ postkongresis en Istanbul. La venonta kunveno estos verŝajne en Tunizio aŭ Egiptujo.

Renato Corsetti



## Estonio: kial la stagnado?

La lastan sabaton de marto en la Instruista Domo de Tallinn okazis la 36a jarkunveno de EAE (Esperanto-Asocio de Estonio) ekde ties fondo en 1923. Krom dudek esperantistoj el diversaj lokoj de Estonio partoprenis la prezidantoj de la Latvia kaj Finnlanda Esperanto-Asocioj, respektive, Margarita želve kaj Tuomo Grundström.

Estraranoj kaj lokaj aktivuloj raportis pri sia pasintjara agado. Oni konstatis, ke la stagnadon en la estona movado kaŭzas diversaj kialoj. En la komercigita mondo idealoj estas kvazaŭ troaj, sed evoluo estas tajdosimila, kaj ni devus, malgraŭ la pesimisma fono, vidi ion esperigan. La kaŭzoj de la kriza situacio kaŝiĝas ne en la internacia lingvo, sed ekster ĝi. Niaj klerigsistemo kaj kulturo estas orientiĝinta al la okcidento, kaj mankas publika subteno al Esperanto. Nia tasko estas montri, ke Esperanto vivas, evoluas kaj funkcias bone. Por tio ni devas ne nur regi la lingvon, sed ankaŭ koni ĝian idean fundamenton, devenon, historion hejmlandan kaj tutmondan, aktualan situacion en la nuna mondo.

Okazis elektoj de nova estraro. Pro manko de freŝaj junaj ambiciaj kandidatoj la kunveno unuanime decidis daŭrigi la mandaton de la nuna estraro por unu jaro. Danke al Ahto Kaljusaar aperas *Informoj de EAE*, kaj aperis enhance kaj tipografie bonega esperantlingva libro pri Estonio. Oni laŭdis iniciatojn de Peeter Aitai, almenaŭ el informiga vidpunkto ili estas tre utilaj. Madis Linnamägi ne povis veni, sed sendis raporton pri sia laboro por Esperanto kun konkretaj proponoj kiel plibonigi la agadon.

**Tõnu Hirsik**

## Kubo: ne nur UK, sed ankaŭ IJK

La Estraro de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kun ĝojo anoncas kaj informas, ke ĝi venis al la decido, ke la 66a Internacia Junulara Kongreso okazu en Los Cocos, Santa Cruz del Norte, Kubo.

Post longa kaj serioza diskutado pri ĉiuj alvenintaj kandidatigoj, esperantistoj el Kubo montris la plej taŭgajn kondiĉojn.

La 66a IJK okazos de la 24a ĝis la 31a de julio en 2010, tuj post la UK.

Pliajn informojn pri la kongreso la Estraro de TEJO donos dum la venontaj monatoj.

**Federico Faccio Peláez**  
TEJO-volontulo



## Kekso por junaj esperantistoj

La 7a renkontiĝo *Kekso* (antaŭe nomata Sub\_18) okazis ekde la 9a ĝis la 12a de aprilo en norda Baden Wurtembergio en la urbeto Creglingen. La 15 junaj partoprenantoj el tuta Germanio kreis denove interesan atmosferon dum tiuj tagoj. Lingvokursoj de Martin Sawitzki kaj André Müller ebligis plibonigi la lingvokonon. Subvencioj de BAVELO (Baden Wurtembergia Esperanto asocio) ebligis aldone interesajn programerojn por la partoprenantoj.

**Leo Sakaguchi**

INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO  
KONDOROS, HUNGARIO, 18-24jul09

**HUMURA LITERATURO EN  
ESPERANTO**



**Informoj, aliĝoj**  
Eric LAUBACHER, 1 rue Bougainville,  
(FR) 78180 MONTIGNY-Bx, Francio  
tel. +33 1 30 96 67 91 rete: kasisto@osiek.org  
Pál KOZSUCH, Vasút u. 3,  
(HU) 5553 KONDOROS, Hungario  
rete: pauljuno@freemail.hu  
OSIEK: <http://osiek.org>

## Esperanto kaj Interreto

3–5 apr 2009 okazis en la ĉeĥa urbo Písek la kvara Sabla Printempo — kleriga seminario kun la ĉeftemo *Esperanto kaj Interreto*. Partoprenis ĝin 33 interesatoj el Ĉeĥio, Slovakio, Belgio, Germanio, Francio.

Vendrede vespere Pavla Dvořáková prezentis la ĵus aperintan esperantlingvan version de la retpaĝaro de la urbo Písek (vidu [www.icpisek.cz](http://www.icpisek.cz) — viaj reagoj ĉe [icpisek@mupisek.cz](mailto:icpisek@mupisek.cz) kaj kopie ĉe [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz) estas bonvenaj, ĉar montras al la urbestro, ke Esperanto vere vivas!).

Diversaj lektoroj poste skize parolis pri la programo de la evento. Petr Baláž kaj Marek Blahuš klarigis pri E@I — organizaĵo kiu okupiĝas pri projektoj rilataj al edukado kaj interreto. Oni parolis pri Esperanta Klavaro por Vinado kaj programo *Ek!*, pri uzado de Skype, pri elektronikaj libroj kaj precipe fama *e-Librejo* de Franko Luin, savita en Ipernity en la paĝo de ĉino Zhang Xuesong (Kabano Deodaro) kaj enkonduke pri ciferecigo de Esperanto-dokumentoj.

Sabate matene kaj posttagmeze oni laboris en tri malsamaj grupoj. La unua grupo temis pri videofilmoj. Unue oni klarigis funkciadon de videokamerao, pri diversaj transiroj, filmomuntado, montris mallongan filmeton pri slovaka kastelo Trenčiansky hrad kaj lernis labori kun la programo *Windows Movie Maker*. Alia grupo surbendigis diversajn tekstojn kaj kantojn. La tria grupo okupiĝis pri skanado kaj korektado de tekstoj kaj pri plibonigo de fotoj.

Vespere oni projekciis videofilmojn kaj kantis je akompano de gitaro. En tiu muzika vespero gvidis nin Pavla Dvořáková kaj Vladimír Türk.

Dimanĉe ĉiuj grupoj prezentis resumon de sia laboro. Ĉiuj tri grupoj laboris efike kaj kun entuziasmo. Oni multe lernis kaj spertiĝis. Petr Chrdle invitis partoprenantojn al diversaj Esperanto-aranĝoj kaj parolis pri la nova Muzeo de Esperanto en Svitavy (Orienta Boĥemio).

Marek Blahuš prezentis novan kompaktdiskon por varbado al Esperanto en pluraj lingvoj. Sekvis vigla diskuto. Ideoj ne mankas kaj la ambicioj estas grandaj, sed por tio oni bezonas kaj serĉas kunlaborantojn.

Fine ni dankis la organizantojn, la geedzojn Dvořák, kaj, kun espero ke tiuj ĉi fruktodonaj kaj valoraj seminarioj daŭros venontan jaron, ni adiaŭis.

**Liba Gabalda**

## Reformi la nereformeblan?

16–17 maj 2009 en la universitato *Justo* (Moskvo) okazis la 24a Konferenco de Rusia Esperantista Unio (REU). En la unua tago ĉeestis ĉ. 30 personoj, en la dua restis ĉ. 20; krome kelkaj aliurbanoj eksperimente partoprenis la konferencon rete. Vespere de la unua tago okazis malgranda koncerto.

Dum du monatoj antaŭ la konferenco okazis preparkunvenoj, estis kolektitaj multaj proponoj. Ja nun finfine ĉiuj konscias, ke REU ne povas plu ekzisti en sama formo: la Estraro fakte ne laboris, ĉiuj deklaritaj celoj fiaskis. Oni promesis drastajn ŝanĝojn... Tamen la kunsidoj pasis en la tradicia stilo: multa tempo estis perdita por bagateloj, plurfoje sonis belaj esprimoj kiel “akcepto de koncepto” kaj “movada agado”...

Sonis la propono entute likvidi REU. Mi unuafoje eldiris tion en 2006 (LOdE, 2006, №8); tiam mi estis sola, oni mokis kaj distretis min. Nun mankis nur unu voĉo por enmeti tiun proponon en la tagordon.

La laboron de la Estraro de REU oni taksis nekontentiga. Estis decidite, ke la Estraro ne plu estu gvida organo, sed havu nur teknikajn funkciojn. Aldone formiĝis la Konsilio, kie reale laborantaj homoj povu interŝanĝi opiniojn kaj akcepti decidojn.

Bedaŭrinde (kvankam atendeble) en la Konsilion trafis nur “tradiciaj” aktivuloj. Ĉiuj sinproponoj de homoj sendepende pensantaj, kapablaj havi opinion malsaman al la “ĝenerala linio”, ankaŭ de homoj simple ne apartenantaj al la “familia rondo” — estis rifuzitaj. Do plejverŝajne nenia opini-interŝanĝo okazos — pro manko de opini-diverseco.

Nova REU-prezidanto estis elektita Miĥail Ĉertilov, vicprezidanto Valentin Seguru, estraranoj Jurij Karcev kaj Roman Bolŝakov.

Pri Universala Kongreso en Ruslando oni jam ne plu parolas. Fina rezolucio aprobis nur sendon de oficialaj leteroj al la Moskva urbestro pri celebrado de la 150-jariĝo de Zamenhof, kaj al la statistika departemento — pri aparta kodo por Esperanto en la popolcenso-2010 (tiamaniere eblus ekscii kvanton da esperantistoj en Ruslando).

**Valentin Melnikov**

Pro nesufiĉa nombro de aliĝintoj, ni estis devigitaj nuligi la postkongresan ekskurson *La Sukcena Lando*.

**KREU**



En Jalto estis gaje.

## Jalto ĉiam aroma

La tradicia esperantista festivalo *Aroma Jalto* ĉi-jare unuigis 92 esperantistojn el naŭ landoj: Pollando, Ukrainio, Ruslando, Germanio, Finnlando, Hungario, Serbio, Litovio, Svedio.

Dum la festivalo (1–10 maj en Jalto, Ukrainio) okazis kvarnivelaj kursoj sub la gvido de Ilona Koutny, Tatjana Auderskaja, Svitlana Kozarenko kaj Aleksandra Kovjazina. Por la instruantoj sukcese pasis enkonduka seminario de ILEI por eduko de Cseh-metodaj instruistoj. La seminarion gvidis Tereza Kapista, ĉeestis 13 perspektivaj Esperanto-instruantoj.

Kadre de Universitato estis prelegoj de prof. Zbigniew Galor, d-rino Ilona Koutny, Konstantin Demijanenko k.a. La distra programo inkluzivis ekskursojn, piedmarŝon, koncertojn, ludojn ktp. Malkrokodilan konkurson gajnis Ilona Koutny. Kiel la sinjorino kaj sinjoro de la *Aroma Jalto* estis elektitaj Aleksandra Kovjazina (Ukrainio) kaj Dennis Bemann (Germanio).

**Volodimir Hordijenko**

## Nenio mankis en Troyes

La franca interasocia kongreso en Troyes 7–11 maj 2009 estis kunorganizita de *Esperanto 10* kaj *Espéranto-France* (UFE). Ĝi kunvenigis 130 partoprenantojn el Francio, Germanio, Belgio, Luksemburgio.

Mi revenis el Troyes tre entuziasma pri la kongreso. La organizantoj starigis kongreson tre ambician kaj riĉ-enhavan, ĝi praktike estis la kopio de UK. Mankis nek la movada foiro, kiu montris la agojn de la regionaj federacioj, nek la “portempa” koruso talente majstrata de Franjo, kiu kunigis dezirantojn dum kvar prov-sesioj kaj montris la rezulton ĉe la fino de la kongreso.

Ne mankis la turismaj vizitoj tre abundaj kaj lerte komentitaj, ne mankis la distraj vesperoj. Teatraĵoj de la Tuluza Teatra Trupo, rep-prezento de *La Pafklik*, filmoj pri Venezuelo tre plaĉis al la publiko. Ne mankis la bankedo kaj la posta balo, dum kiu malmultaj restis sur seĝoj. Ne mankis la ekzamenoj por akiri diplomojn, la asembleoj de asocioj, la literaturaj aŭ strategiaj diskutoj.

Ne mankis la kunveno de ILEI kaj GEE, rakontoj kaj filmoj pri Benino. Ne mankis la libro-servo. Ne mankis la renkontoj pri EDE kaj la prezento pri Indiĝenaj Popoloj. Ne mankis la vigleco de la gejunuloj, kiuj vespere malfrue kuniĝis por malstreĉiĝi en lupo-ludo.

Ne mankis la magia beleco de la urbo Troyes. Vere mankis nenio, kaj la bonhumoro regis de la komenco ĝis la fino. La apartaĵo de tiu kongreso estis la veno de personoj de la ĝemela urbo Darmstadt. Ne ofte troviĝas ĝemeliĝoj de urboj, en kiuj estas duflankaj esperantistoj, kiuj vigle gardas ligojn, kaj eĉ animas la esperantajn aranĝojn.

La venonta kongreso okazos kun la germanoj en Germanujo, do certe la etoso estos ankoraŭ pli nacio-miksa.

**Ginette Martin**

## En Laoso naskiĝis esperantistoj

Unuafoje okazis Esperanto-kurso en Vjontjano, la ĉefurbo de Laoso, danke al la vizito de Lee Jung-kee (prezidanto de KAEM — Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado) kaj Klarita Velikova (prezidanto de Monda Esperanto-Ligo Por Sporto).

Restante en Vjontjano en aprilo ili kune okazigis prelegojn por prezenti Esperanton en Laosa Nacia Universitato kaj en Laosa Singapura Kolegio, por ĉ. 80 profesoroj, studentoj kaj civitanoj. La prezidanto de KAEM prelegis kun bildoj pri la Azia Esperanto-Movado, kaj la temo de Klarita Velikova estis “La lingvo de paco, Esperanto”.

Post la prelegoj por 35 personoj, kiuj ekinteresiĝis pri Esperanto, la du prezidantoj organizis kurson de Esperanto en la korea restoracio *Choŭon* kaj en la hotelo *Ransang*.

Laoso estas ĉirkaŭita de kvin landoj en la Sudorienta Azio, kaj ĉi tiu kurso havas apartan signifon. KAEM sendos vjetnaman kursgvidanton al Laoso ĉi-septembre. Nun, en la KAEMa parto de Azio krom Nordkoreio, Mjanmao, Butano kaj Turkmenio ĉie troviĝas esperantistoj.

**Lee Jung-kee**



## Tutslovakia Renkontiĝo

24–26 apr 2009 okazis ĉiujara Tutslovakia Esperantista Renkontiĝo, ĉi-foje en la okcidenta montara vilaĝo Dobrá Voda, proksime de la urbo Trnava. Partoprenis ne nur slovakoj — kun ĝojo ni bonvenigis ankaŭ esperantistojn el Aŭstrio, Hungario, Ĉeĥio, Francio kaj Kroatio.

La ĉefa temo estis la 150a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Vendrede la renkontiĝon malfermis kaj ĉiujn bonvenigis Katka Nosková el SKEJ (Slovakia Esperanta Junularo) kun Rast'o Šarišský el SKEF (Slovakia Esperanta Federacio). Poste oni translokiĝis al fajro kaj ĝuis kradrostadon. La sabato komenciĝis per kunsido de SKEJ kaj SKEF, en kiu oni vigle diskutis la Esperanto-movadon en Slovakio. Pri la vivo kaj verkaro de la iniciatinto de nia verda lingvo prelegis Katka Nosková kaj pri la Esperanta literaturo Peter Baláž kun Rast'o Šarišský. En postprelega sciotesto E@I donis valorajn premiojn.

Belega suna kaj varma vetero ebligis ekskurson al Burgo Dobrá Voda kun serĉado de “geokaŝuloj”, etaj kestetoj kaŝitaj en naturo. Nia ekspedicio estis sukcesa — la unua trovis la lokon de la kaŝujo spertulo Marek Blahuš. Ni eluzis ankaŭ eblecon viziti memorĉambron kaj tombon de fama slovak poeto Ján Hollý.

Ne mankis tradicia deklaro de rezultoj de du enketoj: la Esperantisto kaj la Ago de la Jaro 2008. La rezulto estis tre-tre malvasta — nur kun diferenco de unusola voĉo gajnis Majka Minichová, la duan lokon akiris Paulínka Kožuchová, la trian Stano Marček. La duan enketon gajnis la plej granda internacia renkontiĝo en Slovakio dum lastaj 20 jaroj — Ago-Semajno (ĉeforganizanto Peter Baláž). Sincerajn gratulojn!

Al programo aktive kontribuis ankaŭ estrarano de SKEJ Mišo Matúšov (pri tradukado de programoj), Lucia Mikulovská rakontis pri siaj rememoroj pri sinjoro Tvarožek, Ma'fo Spekuljak kompletigis la prelegon pri Zamenhof per ekspliko de la hilelismo. Pri la tablaj rolludoj RPG sperte rakontis Peter Novotníček, Katka Nosková prelegis pri Esperanto kiel ekstreme aglutina lingvo kaj la renkontiĝon ni simbole finis per kantado de la Esperanta himno.

La renkontiĝo sukcesis vekti atenton de “aborigenoj”, ĉefe nia verda flago, fiere flirtanta en vento.

**Katka Nosková**



En Dobrá Voda estis bonaj kondiĉoj por laboro kaj ripozo

## Kanti *La Internacion* sur monteto

Post longa interrompo Volgia Esperantista Renkontiĝo (VER) denove okazis en Samara, kie ĝi startis antaŭ kvarono da jarcento. Partoprenis 50 personoj, plejparte el Samara kaj Uljanovsk.

En turistejo, en pitoreska pina arbaro apud la rivero Sok, proksime de ĝia enfluo en Volgon, pasis la tuta varia programo de VER. Gaje kaj vigle gvidis Esperanto-kurson Jurij Karcev, ĉiujn ravis danckurso de Aleksej kaj Jana Kozlov. Elvokis intereson prelegoj pri esperantistoj-internaciistoj dum la Hispana milito 1936–1939 (M. Prilepskaja), pri Esperanto en radio (V. Suslov), pri filmado (V. Dovgij).

Vespere koncertis Anatolij kaj Tatjana Radajev, Aleksandr Ĥrustalev, Grigorij Arosev. Estis plenumita ekologia tasko — senrubigo de arbar-kampeto.

Neforgesebla restos turista marŝo al la fama monteto Cara Kurgano — kaj pro bela desupra vidindaĵo, kaj pro ricevo de granda porcio de adrenalino, mal-supreniĝante laŭ kruta deklivo. Ĉar tiu ĉi marŝo okazis la unuan de majo, sur la monteto okazis festa “Majovka”, kiu finiĝis per kantado de *La Internacio*.

**Valentina Lisijenkova,  
Jelena Kuznecova**

## Ponta Festo en Frankfurto

La trian fojon EABB (Esperanto-Asocio de Berlino-Brandenburgio) partoprenis la Pontan Feston en Frankfurto-ĉe-Odro per informstando je la 1a de majo. Tiu stando informis pri Esperanto, diversaj eblecoj de aplikado de la Internacia Lingvo kaj la eblecoj lerni ĝin, sed ankaŭ pri aktualaj preparoj pri

la balotoj al Eŭropa parlamento — do ankaŭ pri EDE: *Eŭropo-Demokratio-Esperanto*.

Denove tio estis bona okazo por pluraj esperantistoj el Francio, Pollando, Taĝikio, Berlino kaj Brandenburgio, kiuj kunvenis por ĝui kaj demonstri internacian etoson. Pro tempaj malfacilaĵoj ĉi-foje ne venis multaj esperantistoj, sed ĉio fariĝis sukcesplena. Krzysztof Kolanowski (Pollando), kiu ankoraŭ laboras en la universitato Viadrina en Frankfurto, ne nur aktive preparis la informstandon, sed ankaŭ tre bone prezentis Esperanton al la alvenintoj.

Stokon da freŝeldonitaj faldfolioj kaj specialan bildkarton de GEA ni disdonis. Komence de la festo okazis la transdono de la Esperanto-traduko de faldfolio pri Mesia Kapelo de Frankfurto al la respondecata prosperiga societo. La preĝejo konstruiĝis en la jaroj 1915–1916 laŭ siberia ligna konstrumaniero, dum kelkaj jaroj ĝi nomiĝis “Preĝejo de rusoj”. Krom tio oni aŭdis pri la stato de la Esperanto-traduko de la retejo de la turisma societo de Frankfurto, kiu ĝis nun ne sukcesis veni en la interreton kaj pri komuna projekto rilate al konata preĝejo en Potsdamo.

Ĉar kelkajn tagojn antaŭ la aranĝo publikiĝis anonceto en loka gazeto pri la informstando, kelkaj homoj rekte venis al ni por informoj kaj eĉ deziris ricevi promesitan lernolibron.

Post la fino de la festo ĉiuj esperantistoj bone amuziĝis en azia restoracio en Słubice, en Pollando trans la rivero Odro, kaj diskutis pri la sekvontjara “Ponta Festo”.

**Ronald Schindler**  
prezidanto de EABB

## Malferma Tago en Roterdamo

Anna Löwenstein, verkistino kaj membro de la Akademio de Esperanto, estis la ĉefpreleganto de la 30a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA kiu okazis la 25an de aprilo, kaj allogis 65 vizitantojn. La domo de UEA estis kon- ata al Löwenstein jam de ŝia periodo kiel oficisto de UEA antaŭ tridek jaroj. Ŝi faris du prelegojn. En la unua ŝi rememoris pri tiu tempo kaj aparte pri la virina agado de UEA, kiu tiam estis tre aktiva. En la alia prelego ŝi parolis pri sia verkista aktivado, prezentante interalie sian novan historian romanon “Morto de artisto”.

Kun la movada vivo en la venontjara kongreslando konatigis Juan Besada el Kubo, kiu prelegis pri la historio kaj nuntempaj apartaĵoj de la tiea Esperantomovado. La nederlanda esperantista paro Johan kaj Svetlana Derks rakontis pri sia jarkomenca instrua aktivado en Afriko kaj pri interesa projekto realigota en Burundo, pri kiu ili ricevis ideon dum sia vojaĝo. Douwe Beerda el Nederlanda Esperanto-Junularo prezentis la agadon de NEJ kaj la viglan retejon pri homaj rajtoj, [www.homajrajtoj.org](http://www.homajrajtoj.org)

Surpriza programero estis tri filmoj. Unu estis farita en la unua Internacia Junulara Kongreso en la nederlanda vilaĝo Groet en 1938, kie estis fondita Tutmonda Junulara Organizo, la posta TEJO. Du aliaj estis filmitaj de la brita esperantisto John Gbourne en IJK en Gdansk kaj UK en Varsovio en 1959. Gbourne donacis la originalajn 8-milimetrajn bendojn al UEA. La fondaĵo Esperantic Studies Foundation subvencis kaj organizis ilian kopiadon sur DVD.

La Libroservo vendis librojn k.a. varojn sume por 1307 eŭroj.

La venonta Malferma Tago de la Centra Oficejo okazos la 28an de novembro kaj estos dediĉita al la centa datreveno de la naskiĝo de prof. d-ro Ivo Lapenna.

**GK UEA**



La Esperanto-domo en Berlino

## GEA malfermis oficejon en Berlino

La multjara revo de Germana Esperanto-Asocio (GEA) realiĝis: la 4an de aprilo GEA-prezidanto d-ro Rudolf Fischer senvaligis ŝildon, kiu atentigas, ke tie ĉi, en Einbecker Strasse 36, en Berlin-Lichtenberg, nun estas la nova tutlanda oficejo de GEA. Samtempe ankaŭ Julia Hell por Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj Peter Kühnel por Esperanto-Ligo Berlin senkovrigis pliajn ŝildojn, kiuj montras, ke ankaŭ tiuj du Esperanto-organizoj hejmas en la sama domo.

Per tio finiĝis grava etapo, iom post iom renovigi la sufiĉe kadukan domon, kiun posedas la konata esperantisto Johano Pachter. Kiam antaŭ pli ol tri jaroj granda incendio detruis la tegmenton de la konstruata domo, ĉiuj revoj ŝajnis esti vanaj. Sed per obstina laboro Johano Pachter, Peter Kühnel kaj Martin Schäffer, ĝenerala sekretario de GEA, tamen realigis la rekonstruadon, kaj oni eĉ povis alkonstrui plian tegmentan etaĝon.

Ankoraŭ ne ĉio estas preta, sed GEA ne volis pli longe atendi. Manko de tutlanda centro kaŭzis ĝis nun multan laborperdon per la dissemiteco de materialo kaj disdivido de centraj taskoj al aktivuloj dise vivantaj en la tuta Germanujo.

En 2009 GEA intencas reorganizi sian laboron, helpe de la “Berlina Oficejo” (BerO). Tiu nomo estas jam tradicio, ĉar GEJ ĝin uzis jam antaŭe, kiam BerO servis kiel GEJ-centro en periodo interrompita per la incendio.

Kune kun la inaŭguro de la Berlina Oficejo GEA ekhavis sian kvaran dungiton. Henryk Wenzel kiel oficejestro transprenis multajn administrajn kaj informajn taskojn. La financado de tiu kuraĝa elpaŝo de GEA estas sekurigita por iom pli ol unu jaro, danke al donackampanjo “mecenato serĉas mecenatojn”, kiu havigis pli ol 14 mil eŭrojn al GEA. Krome la Fondaĵo de Familio Fischer kontribuas jare per ĉirkaŭ 1200 eŭroj.

Ĉio tio tamen ne sufiĉos por garantii stabilan ekonomian staton dum pli longa tempodaŭro. GEA planas altigi la nombron de pagantaj membroj kaj precipe aliri diversajn subvenciojn, ankaŭ de la Eŭropa Unio. Nur tiam la celo, plivastigi Esperanton, povos realiĝi helpe de la nova oficejo.

**Rudolf Fischer**  
prezidanto de GEA

## Steleto jubileas

La tradiciaj Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando okazis la 14–15an de marto en la urbo Kouvola en sudorienta Finnlando kun kvindek partoprenantoj. Inter ili estis multaj nevidantoj, kaj la programa temo estis vidhandikapo: La Finnlanda blindula Esperanto-societo *Steleto* festas siajn 90 jarojn.


Estis ekspozicio pri la brajla skribo kaj aktivado de vidhandikapuloj. Prelegis Raimo Tanskanen pri la historio de *Steleto* kaj Arvo Karvinen, longtempa ĝenerala sekretario de la Finnlanda blindula asocio, pri la internacia organizaĵo de vidhandikapuloj. Nia norvega gasto estis lektoro Otto Prytz; la temoj de liaj tri interesokaptaj sciencaj prelegoj estis la brajlo kaj ĝia ŝanĝiganta — sed ne malaperanta! — rolo kaj Esperanto en la internacia vivo kaj organizaĵoj de blinduloj.

La bonegaj muzikistoj el *Steleto* sub la gvido de Raimo Tanskanen, Aatu Moilanen kaj Matti Ekola faris kaj gvidis gajan muzikan vesperon. Oni ekkonis ankaŭ kantojn de la unua verkisto, elektinta dialekton de la finna lingvo, Hjalmar Nortamo en Raŭmo, urbeto laŭnome konata en Esperantujo.

La jarkunveno de EAF elektis Tuomo Grundström kiel asocian prezidanton. En la estraron estis elektitaj por dujara mandato: Päivi Saarinen (viceprezidanto), Tiina Oittinen (sekretario) kaj Markku Saastamoinen; daŭras la mandatoj de Börje Eriksson, d-ro Taneli Huuskonen kaj Paula Niinikorpi; kiel vicestraranoj estis elektitaj Arvo Karvinen, Jukka Laaksonen kaj Vilorg Teräväinen.

Pluaj eventoj de la jaro estos somera kurso en la popolalternejo ĉe la ortodoksa monaĥejo Valamo en Heinävesi tuj post somermezo, kaj postkurso ekskurso al la malnova monaĥeja insulo Valamo en la lagego Ladogo en Ruslando. La Aŭtunaj Tagoj okazos en la urbo Pori ĉe Botnia Golfo, kaj decembro estas Zamenhof-festa monato.

**Tuomo Grundström**





## Civitanoj aktivas

*Je la romkatolika Paska feriado en Ĉaŭdefono (Svislando) okazis pluraj kunvenoj kadre de la Esperanta Civito. Ĉi-sube ni resumas tiujn kunvenojn surbaze de multaj informoj de HeKo.*

Ok paktintoj estis reprezentitaj ĉe la **Forumo de la Esperanta Civito**. La direktivo pri eksteraj rilatoj, unuanime aprobita, estas plia paŝo cele al la interna koherigo de la Pakto; samtempe ĝi normigas la aplikon de la konstitucia artikolo pri legacioj. La Forumo renovigis la Kortumon por 2010–2012. Estis akceptitaj du novaj paktintoj: la landa asocio de Kamerunio kaj Hilelista Esperanto-Komunumo. Ĉi-lastaj tuj nomumis siajn forumanojn: c-ano Raymond Bri-sebois el Kanado kaj c-ano Armando Zecchin el Italio.

La **Senato de la Esperanta Civito** unuanime akceptis rezolucion pri Palestino, kiun proponis la Verda grupo. La teksto rezultis el longa senatokonsulto, kie ne mankis akcentoj pli israelemaj (Martinelli, Trifonĉovski) kaj pli palestinemaj (Felszeghy), sed fine ĝian ekvilibrantan enhavon resumis la Konsulo, kiu anoncis sian favoran voĉon.

La Asembleo de **Feminisma Esperanta Movado** konstatis kreskon de la asocio kvante kaj kvalite. La kotizanta membraro kreskis je 15%, inkluzivante politike aktivajn feministinojn kiel Carmen San-Segundo en Andaluzio, valorajn intelektulinojn kiel Olga Kerziuk en Londono kaj rimarkindajn verkistinojn de la nova generacio kiel Etel Zavadlav en Kroatio. La kresko rezultas unuavice el la regule aperanta revuo *Femina*, ĉefredaktata de sen. Perla Martinelli.

Sep civitaninoj el ses landoj partoprenis en la **Ateliero pri beletra kreivo** sub la gvido de Giorgio Silfer. La atelieranoj difinis kvar fundamentajn rilatojn: al nia lingvo, al la vero, al la sekso, al la socio. Estas ankoraŭ frue por paroli pri la fonda de literatura skolo, sed probable naskiĝos io ĝis nun ne konata en Esperantio: verkistina rondo.

La aktiveco kadre de PEN Internacia restas la ĉefa, sed ne la sola de la **Esperanta PEN-Centro**, por reprezenti nian literaturon en la ekstera mondo; tial oftigi la partoprenon en aliaj aranĝoj ol la renkontoj de PEN Internacia — jen la esenca konkludo de la Asembleo de la Esperanta PEN. La Asembleo konfirmis c-inon Milena Makaveeva kiel sekretarion de la PEN-premio *La Verko de la*

*Jaro* kaj precizigis komision al sen. Nilsson koncerne la kandidatecon de Marjorie Boulton al la Nobel-premio. Ĝi akceptis principe du proponojn de libroj taŭgaj por prezenti Esperantion al neesperantlingvaj verkistoj.

La 14an de aprilo per la dediĉo de cenotafo je la nomo de Gaston Waringhien (1901–1991), kun plena konsento de lia filino estis inaŭgurita la **Esperanta Panteono** en la urba kremaciejo en Ĉaŭdefono. La elektita dato, tiu de la forpaso de Zamenhof, estas festotago en la Esperanta Civito: la tago en kiu oni honoras la esperantajn pionirojn.

La Senato estis imponita de la digna beleco de la salono: “Ŝajnas ke ĝi atendis ĝuste Esperantion”, komentariis la Vickonsulo, sen. Marie-France Conde Rey. “Tre pozitive, ke ekzistas neniu religia simbolo, kvankam oni kvazaŭ spiras intiman religiecon: ĉi tiu estus aŭtenta templo por la ateistoj”, aldonis sen. Dieter Rooke. La vorton “templo” uzis ankaŭ la vickonsulo pri edukado, sen. Bertil Nilsson, menciante, ke Zamenhof pensis pri la starigo de la unua hilelisma templo ĝuste en Svislando.

## Plia Subĉiela Leciono

9 maj gesamideanoj el Lorena kaj Guaratinguetá (Brazilo) okazigis plian “Subĉielan Lecionon”. En bela posttagmezo, ili vizitis Aeronautikan Altlern-ejon en Guaratinguetá. Ili piediris en la militista vilaĝo kaj rigardis ekspozicion kaj aviadilon. Sur benkoj en bela placo, proksime al busto de la pioniro Santos Dumont, la grupanoj legis kaj tradukis la tekston *Ĉu militistoj deziras militon?*, praktikis Esperanton per demandoj kaj respondoj, kaj lernis vortojn pri aviadotemo. La leciono finiĝis per agrabla lunĉo. Dum la piedirado, oni disdonis flugfoliojn pri la Internacia Lingvo.

**Paulo Sérgio Viana**

Apud la busto de Santos Dumont



Eventoj

## La naŭa Printempa Renkontiĝo



Je la alveno de printempo Vjetnama Esperantista Junulara Organizo VEJO ĉiujare okazigas Printempan Renkontiĝon. La naŭa renkontiĝo okazis 22 mar 2009.

Jam antaŭ la malfermo, la artistoj de la klubo *Nova Sunbrilo* el Yumejho-sekcio de Hanoja Esperanto-Asocio, per viglaj kantoj alportis novan sunlumon al la kunveno. Ĉeestis gvidantoj de VEJO kaj multaj membroj de diversaj sekcioj kaj kluboj de VEA kaj HanEA.

Trinh Hong Hanh, estrino de la klubo KOVELI, prezentis la celon de la renkontiĝo. Nguyen Xuan Thu, ĝenerala sekretario de VEJO, informis pri la agado de VEJO kaj pri intenco de Osmo Buller viziti Hanojon por decidi pri preteco de Vjetnamio kandidatiĝi por gastigi UK-on en 2012. Li ankaŭ mallonge informis pri la malfermo de nova Esperanto-kurso en la Fremdlingva Universitato, pri la nova Esperanto-klubo en la lernejo Nguyen Sieu, pri la ĵus aperinta vjetnama versio de la lernolibro *Zagreba Metodo*.

Rimarkinda estas la traduko kaj enretigo de la Deklaro de Vjetnama Unio de Amikecaj Organizo (VUAO) kontraŭ la decido de la usona supera kortumo malakceptinta la plendojn de la vjetnamaj viktimoj de oranĝa agilo/dioksino kontraŭ la kemiaj kompanioj en Usono. Dum du tagoj post la enretigo venis pozitivaj reagoj de esperantistoj el Japanio, Koreio, Italio, Germanio, Serbio kaj Ĉeĥio. Tio estas kontribuo de VEA al la popola diplomatio.

Sinsekvaj artaj programeroj kun kvizoj varmigis la etoson.

**Informada komitato**

## Unufraze

★ 23 mar Stefano Keller, reprezentanto de UEA en Ĝenevo, alparolis la UN-Konsilantaro pri Homaj Rajtoj k prezentis kvar okazojn de rompoj de lingvaj rajtoj en Malajzio, Danlando, Turkujo k Aŭstralio. (RC)

★ Giorgio Silfer reprezentis la E-literaturon, inter dudek tri literaturoj, en la 41a Internacia Verkista Renkonto, okazinta 25-29 mar 2009 en Bled, Slovenio (HeKo)

★ “Cent jaroj de UEA” estas la titolo de poŝtmarko eldonita en Bosnio k Hercegovino en la eldonkvanto 30 mil ekz-oj. (*Tempo*)

★ 14 mar ekfunkciis E-kurso en la Tianjin-a Inĝeniera Normala Instituto por 35 studentoj; la lecionoj dufoje en semajno gvidas Jan Zuwu, la prezidanto de Tianjin-a E-Asocio. (TEA)

★ 16 maj moskva e-istino Ksenija Prilepskaja estis por mallonga tempo arestita en Moskvo kiel kunorganizanto de nepermesita manifestacio por la rajtoj de gejoj, lige kun la ŝlagrokonkurso de Eurovision. (*Libera Folio*)

★ *La sekreta miraklo* de Borges en Eo (*Sezonoj*, 2008) estis ekspoziciita en la stando de la fondaĵo Borges kadre de la 35a Bonaera Internacia Librofiro en aprilo en la ĉefurbo de Argentino. (RS)

★ La Estraro de Kroata E-Ligo kunlabore kun E-Societo Split komencis agi por doni al iu strato en Split la nomon Ivo Lapenna okaze de ties ĉi-jara centjariĝo. (*Tempo*)

★ 19 maj prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, parolis pri lingvaj homaj rajtoj en la universitato Jadavpur (Kolkato, Barato) kadre de la labortendaro “Ebligi la elementan edukon en multlingva medio: enfokusigi Okcidentan Bengalandon”. (Landa Agado)

★ 15 mar 2009 la Akademio de Eo voĉdone akceptis la Liston de Rekomendataj Landnomoj, ellaboritan de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, k du ŝanĝojn en la statuto de la Akademio. (AdE)

★ Ranieri Clerici, vicprezidanto de UEA, 29 mar anoncis sian decidon rezigni pro sanproblemoj pri estraraneco; ĉar dank’ al la laboro de Clerici la eksteraj rilatoj de UEA disvolviĝas sur sufiĉe solida bazo, la Estraro ne proponos al la Komitato alelekton de nova estrarano por la restanta mandatperiodo, t.e. ĝis la UK 2010. (GK UEA)

★ 12 apr ok E-Grupoj de Tokio kunorganizis, kun aŭspicio de la Japana E-Instituto, unutagan Kurson de Eo, en kiu prelegis Ulrich Lins k Isino Yosio; ĉeestis ĉ. 40 homoj. (Landa Agado)



## Nova esperantologia disertacio

La 23an de aprilo 2009 en kunsido de konsilio pri defendo de doktoraj kaj kandidataj disertacioj ĉe la Sankt-Peterburga Universitato estis prezentita disertacio *Prononca normo en Esperanto* de la Peterburga filologo Oksana Viktorovna Burkina.

Ŝi sukcese defendis la disertacion. La prezenton de ŝia disertacio sekvis vigla diskutado, en kiu oni menciis tre altan sciencan nivelon de la prezentita verko kaj gravan rolon de tiu kaj tiuspecaj esploroj por la moderna ĝenerala lingvistiko. La aŭtoro de la disertacio ricevis proponojn publikigi ĝin parte aŭ plene en fakaj periodaĵoj kaj libroforme.

La redakcio de *La Ondo de Esperanto*, kies fidela abonanto kaj okaza kunlaboranto Oksana estas, kore gratulas la novbakitan kandidaton de filologiaj sciencoj kaj deziras al ŝi pliajn kaj pluajn sukcesojn en scienco, precipe en esperantologiaj esploroj.

LOdE

## Sur la Krakova ĉefplaco

14–16 maj 2009 sur la ĉefplaco de Krakovo (Pollando) okazis la Scienca Festivalo, organizita de krakovaj superaj lernejoj kaj sciencaj institutoj.

La Esperanto-stando, preparita de la Studenta Scienca Esperanto-Rondo de Jagelona Universitato kun helpo de ILEI-Pollando, ĝuis grandan popularcon. Esperanto estis prezentata inter kelkaj lingvoj instruataj en la universitato. Maria Majerczak perfekte gvidis rapidan Esperanto-kurson. Okazis du konkursoj pri la lingvo kaj movado. Natalia Dobrowolska surstrate prezentis fragmentojn de *Sinjoro Tadeo*. Flugfolioj kaj alia materialo pri Esperanto, estis disdonitaj inter vizitintoj de la stando kaj partoprenantoj de la Festivalo sur la ĉefplaco.

Andrzej Sochacki

**Peterburgo:** Per siaj disertacio kaj kontribuo al la Peterburga Lingva Festivalo Oksana Burkina meritis la titolon “La Esperantisto de 1<sup>a</sup> Monato”. (*Fotis Sergej Andrejsons*)

## Lingva Festivalo en Peterburgo

5 apr okazis Lingva Festivalo, kiun oni finfine plenrajte povas nomi Sankt-Peterburga; la du antaŭaj festivaloj nomiĝis same, sed ili lokiĝis en la apudurbo Puŝkin. Ŝanĝo de la ejo al la pli facile atingebla helpis altiri pli da publiko kaj amaskomunikiloj.

Alia ĉi-jara novaĵo estis longigo de la tempo por prezentoj — de duonhorio al 40 minutoj, laŭ konsilo de Dennis Keefe, la patro de la lingvofestivala movado. Oni ankaŭ forigis la manĝpaŭzon. Enketado montras, ke ĉiuj novaĵoj estis bone akceptitaj de la publiko kaj prezentantoj de lingvoj.

En la festivalo okazis kvar prezentoj de Esperanto — tri laŭ plano (de moskvano Anatolo Krasnokutskij kaj peterburgano Vjaĉeslav Ivanov) kaj unu, laŭ la konsilo de Dennis Keefe, anstataŭ la neokazinta prezento. Esperanto havis neordinare grandan atenton, multaj menciis ĝin en la enketiloj, petis detalajn informojn, retadresojn ktp.

Lernolibrojn de Esperanto ricevis lingvemuloj, gajnintaj en la lingva konkurso. Krom tio okazis prezento “Lingvokonstruado” pri moderna interlingvistiko fare de esperantisto Miĥail Kolodin. Prezenton “Fonologio” faris Oksana Burkina, kies ĉefa esplorkampo estas fonologio de Esperanto.

La plej sukcesa prezento de la festivalo, laŭ enketado de la publiko, estis tiu fare de la prezidanto de la peterburga societo de ingriaj finnoj Vladimir Kokko, li prezentis la finnan kun speciala emfazo al la finna en Ruslando. Aliaj prezentoj kun relative alta rilatumo de tre kontentaj vizitintoj estas: la ĉukĉa, la kpelea, la araba, la belorusa, la udmurta, la jida, la oseta kaj la malnovslava.

Eblas konstati, ke en la vico de la tri peterburgaj festivaloj tiu ĉi estis la plej amasa, la plej bela kaj la plej sukcesa. Grave kontribuis al ĝia sukceso aktiva partopreno de la gastiganta institucio, la Neva Instituto de Lingvo kaj Kulturo. Ili provizis al la evento tion, kio ĉiam mankas por esperantistaj projektoj, — la manojn. Dekduo da studentoj plentempe deĵoris en la ĉambroj kaj ĉe la registrejo. Ili tre ŝatis la ideon kaj la etoson de lingva festivalo kaj proponas organizi ĝin sekvajare denove en ilia ejo.

Vjaĉeslav Ivanov



## La galega lingvo minacata

### *Dafydd ab Iago el Bruselo*

Laŭ polica raporto, pli ol 20 mil homoj (pli ol 50 mil laŭ la organizantoj) manifestaciis en majo por la rajto uzi la galegan lingvon. La manifestacio sekvis regionajn elektojn en marto, kiam la hispana Popolpartio (PP) gajnis plimulton en la galega parlamento, danke al nur unu deputito. La manifestacio en Santiago de Compostela, la galega ĉefurbo, alvokis por la “rajto vivi en la galega”. La manifestaciintoj volas, ke la galega registaro ŝanĝu sian lingvan politikon. Ili timas, ke la galega estos sub minaco pro tio, ke PP nun denove regas.

Dum la kampanjo PP promesis nuligi kelkajn leĝojn favore al la galega. Laŭ PP, la hispana devas esti protektata en Galegio per politiko de “libera elekto” de la lingvo. Aktivuloj de la galega lingvo protestas, ke minacata estas ne la hispana, sed la galega — lingvo tre simila al la portugala, parolata en ĉi tiu nord-okcidenta parto de Hispanio. PP ankaŭ celas nuligi la Lingvan Akton, kiu reguligas la uzadon de la galega en



Katedralo de Santiago de Compostela dum la nokto (wikimedia commons)

la lernejoj. Ĉi tiu leĝo antaŭvidas, ke almenaŭ 50% de la klasoj estu instruataj en la galega.

La nova registaro fine de majo klarigis al publikaj sindikatoj sian proponon rilate al publikaj dungitoj. Pro tio, ke la plejmulto de homoj en Galegio parolas la galegan, ĝia kono estis unu el la kon-

diĉoj por fariĝi ŝtata dungito en la regiono. La ideo estas, ke ĉiuj regionaj ŝtadungitoj devas koni la lingvon de la vasta plimulto de la homoj en la regiono. Reformante la Leĝon de la Publika Servo de Galegio, la nova registaro promocios la “liberan elekton”. Tio signifas, ke regionaj dungitoj ne nepre devos koni la galegan kaj povos esti dungitaj kun nura kono de la hispana.

La pravigo de la nova leĝo — laŭ la teksto mem — estas, ke la hispana kaj galega estas “kun-oficialaj” en Galegio. “La publikaj povoj devas garantii la normalan kaj oficialan uzadon de la du lingvoj, — tekstas la leĝo-teksto. La regiona registaro ankaŭ volas promocii la “movecon” de galegoj en Hispanio kaj pro tio volas eviti “barierojn lingvajn”, kiuj — laŭ ĝi — povos aperis, se oni tro promocios la galegan. Unu el la sindikatoj jam reagis, ke la leĝopropono montras la “malamon” de la nova registarestro Alberto Núñez Feijóo al la galega. Laŭ preparolanto de la sindikato CIG-Ensino Anxo Louzao, en la hispana gazetaro, la parlamenta plimulto de la PP en Galegio ne donis la rajton malestimi la lingvon kaj starigi politikon konduke al ĝia ekstermo.

## Tra la mondo sur du radoj

**Esperantista paro, Roz (Rose Sanz) kaj Cirilo (Cyrille Pinardon), komencis ĉi-printempe grandan biciklan vojaĝon. Unue ili vojaĝis en Francio, poste tra iris Italio, Kroation, Montenegron kaj nun ili biciklas en Grekio. Monique Prezioso intervjuis ilin por *La Ondo*.**

*Vi foriras por du jaroj bicikle tra la mondo, tio ne estas kutima. Kiuj estas viaj celoj?*

Ni ĉiam sciis, ke ni realigos tiun vojaĝon. Ni ĉiam revis pri vizitado de aliaj landoj! Pli bone privivi niajn revojn ol prirevi nian vivon. Ĉu ne?

*Ĉu vi longe preparis tiun vojaĝon? Foriri ne estas facila decido!*

Komence, ni pensis atendi ĝis nia emeritiĝo, poste ni decidis preni grandegan feriadon je du jaroj...

*Kial bicikle? Kial ne petveturi aŭ flugi?*

Petviture oni ne sendependas. Aviadile oni tro rapide veturas de iu lando al alia. Ni ĝuas la lukson iri tien, kien ni deziras, laŭ la malfermitaj landoj, kompreneble.

*Ĉu vi multe trejniĝis?*

Tute ne. Ni biciklas 80 aŭ 100 km/tage. Tio aspektas multe, sed potage, ni veturas 13 km/hore. Iom post iom, ni sukcesiom tiom!

*Via vojaĝo kostos multe. Ĉu vi heredis, aŭ gajnis je loterio?*

Ja ne. Ni nur ŝparis iom da mono por neatenditaj problemoj — vizoj kaj la necesaj flugoj aŭ ŝipadoj. Ni ofte tendumos kaj ni vizitos esperantistojn. Kaj ni ne plu havos la kutimajn hejmajn elspezojn. Vi ankaŭ povos helpi nin, ĉar ni

vendos poŝtkartojn de la landoj kiujn ni trapasos. Ni preferas tiun sistemon ol peti subvenciojn.

*Ĉu vi multe uzos la “Pasportan Servon”?*

Jes, kompreneble, kaj ni rimarkis dum ni trapasis Francion, ke la francaj gastigantoj ne ofte gastigas aliajn francajn esperantistojn. Ni ankaŭ uzos aliajn biciklistajn gastigservojn, kie ni povos varbi pri Esperanto.

*Kaj kio pri Esperanto?*

Inter ni, ni tre ofte parolas Esperanton. Multaj francaj ĵurnaloj interesiĝis pri nia vojaĝo, kaj tio donis okazon por paroli pri nia komuna lingvo, ni ankaŭ tre ofte haltas, aŭ uzas kromvojon por foti Esperantajn stratojn. Ni eĉ estis invititaj en S-ta Rafaelo, Francio, por prelegi en du lernejoj.

*Bonan vojaĝon!*





## Ekonomia potenco de lingvoj: la angla superas, sed kiuj sekvas?

de Jukka Pietiläinen

La grandeco de lingvoj estas ofte disputata, ĉar ne estas aparte facile taksi la nombron de denaskaj parolantoj de tiu aŭ alia lingvo. Malgraŭ tio la opinio pri grandeco de plej grandaj lingvoj estas ofte sufiĉe unuanima kaj se temas pri problemoj, tiuj rilatas ofte al difino de aparta lingvo disde alia (ekzemple, ĉu ekzistas unu aŭ pluraj ĉinaj lingvoj, malajaj-indoneziaj lingvoj aŭ arabaj lingvoj).

Laŭ kutima difino la plej grandaj lingvoj estas la ĉina, la angla, la hispana, la araba, la portugala kaj tiel plu. Tamen kiam temas pri forteco de lingvoj, ne temas nur pri nombro de parolantoj, sed pri ekonomia forteco de iliaj parolantoj. Unu finnlanda pensiiĝinta ĵurnalisto reagis en leteroj de legantoj al pli frue esprimita opinio, ke la hispana fariĝos la tutmonda lingvo de estonteco, ĉar ĝia parolantaro kreskas forte. Li emfazis, ke la grandeco de la parolantaro ne gravas, sed tio, kiuj estas la parolantoj. Do, ekonomie pli fortaj parolantoj gravas pli ol ekonomie malfortaj.

Tamen tre malofte aperas informoj pri ekonomia forto de unuopaj lingvoj. Al tio troveblas pluraj kialoj: unu povas esti, ke jam la difino de grandeco de lingvoj laŭ nombro de parolantoj estas malfacila, se aldoni al tio ankaŭ ekonomion, la malfacilaĵoj nur kreskas. Due, la pritakso de ekonomiaj diferencoj inter landoj estas tre malfacila, kaj se aldoni al tio lingvojn, la malfacilaĵoj nur kreskas.

Tamen indas provi. En la apuda tabelo aperas ekonomie la plej fortaj lingvoj. La kalkulado estas farita dumaniere, unue per valoro de la nacia produkto sen ekvilibro de la valutaj kurzoj, kaj due, atentante la malegalecojn de la prezniveletoj en diversaj landoj kaj uzante aĉetpove egaligitajn valorojn de naciaj produktoj.

La naciaj produktoj de landoj estas kalkulitaj kutime nur al la ĉefa lingvo, se ĝi estas la sola oficiala kaj parolata de plej granda parto de loĝantaro. Se en iu lando estas pluraj oficialaj lingvoj, la nacia produkto estas dividita inter diversaj lingvoj laŭ la grandeco de iliaj parolantaroj. Tamen kiam temas pri grandaj proporciaj diferencoj inter lingvogrupoj estas nature, ke la anoj de la malpli granda estas pli ofte devigataj uzi la pli grandan lingvon ol la anoj de la pli granda.

Kroma problemo estas la landoj, kie iu lingvo estas oficiala, sed kie ĝi estas malofte denaske parolata. En tiuj kazoj la ekonomio de tiu lando ja iomete kontribuas al la ekonomia forteco de sia oficiala lingvo, sed tamen ne indas kalkuli la tutan nacian produkton de tiu lando por la oficiala lingvo, kiun eble granda parto de la loĝantaro eĉ ne scipovas. Do, en tiuj kazoj 10–20% el nacia produkto estas kalkulata por la oficiala lingvo.

En iuj landoj estas ankaŭ grandaj minoritatoj kvankam iliaj lingvoj ne estas oficialaj. Ekzemple en Usono la signifo

de la hispana lingvo estas iom pli alta ol nur marĝena. Tamen la grupoj de enmigrintoj estas ofte malpli riĉaj ol la ĉefa gento kaj krome la enmigrintoj devas, almenaŭ parte uzi ankaŭ la oficialan lingvon de sia loĝlando. Tiel ne indas kalkuli pli ol nur 3% el nacia produkto de Usono por la hispana lingvo. La samo validas ankaŭ por aliaj enmigrintaj grupoj. Tamen, tiuj grupoj estas kutime malgrandaj kaj ju pli malgrandaj ili estas, despli certe ilia ekonomia aktiveco direktiĝas al la oficiala lingvo de la lando.

Ankaŭ bonaj fremdlingvaj scioj povas havi influon al la ekonomia potenco de tiuj lingvoj. Homo, kiu parolas la anglan kaj uzas ĝin en sia laboro, certe kontribuas al la ekonomia forteco de la angla. Tamen nur relative malgranda parto el tiuj, kiuj scipovas fremdajn lingvojn, uzas ili regule, kaj kalkulado de tiaj ekonomiaj fluoj estus malfacila kaj ĝenerale ankaŭ marĝena. Fremdaj scioj estas lasitaj ekster la analizo.

### La ekonomia grandeco de lingvoj (% el la nacia produkto de la tuta mondo)

	A	B	C
1. La angla	34,5	24,7	1
2. La japana	8,1	6,0	4
3. La germana	7,8	4,5	5
4. La hispana	7,1	7,2	3
5. La ĉina	5,3-6,9	13,4-17,8	2
6. La franca	5,9	3,6	6
7. La itala	3,9	2,61	10
8. La portugala	2,8	3,15	7
9. La rusa	2,63	3,07	8
10. La araba	2,5	2,84	9
11. La korea	1,9	1,78	12
12. La nederlanda	1,90	1,2	13
13. La sveda	0,83	0,48	21
14. La hindia	0,813	2,6	11
15. La turka	0,81	0,9	16
16. La pola	0,77	0,87	17
17. La greka	0,70	0,58	19
18. La norvega	0,69	0,3	
19. La indonezia	0,6-1,0	1,0-1,5	14
20. La dana	0,58	0,29	
21. La finna	0,42	0,36	28
22. La kataluna	0,4	0,27	
23. La taja	0,38	0,80	18
24. La persa	0,31	0,54	20
25. La ĉeĥa	0,31	0,36	29
26. La bengala	0,29	1,0	15
27. La rumana	0,29	0,31	
28. La hungara	0,27	0,32	30
29. La ukraina	0,2	0,41	27
30. La hebrea	0,2	0,26	
La telugua		0,46	22
La marata		0,46	23
La urdua		0,46	24
La tamila		0,44	25
La panĝaba		0,44	26
Ĉiuj aliaj	7%		

A. Laŭ la nacia produkto

B. Laŭ la aĉetpove ekvilibrita nacia produkto

C. La ordo laŭ ekvilibrita nacia produkto



La nombroj por la nacia produkto de unuopaj landoj estas prenitaj el la anglalingva Vikipedio en 2008 (nacia produkto en jaro 2007). La neprecizeco de la nombroj por la ĉina kaj la indonezia estas pro tio, ĉu kalkuli la plenan loĝantaron de Ĉinio kaj Indonezio al siaj respektivaj oficialaj lingvoj.

Unuavice en la listo mirigas la forta pozicio de la angla lingvo. Ĝi ne nur estas la ekonomie plej potenca lingvo, sed ĝia ekonomia potenco estas same forta ol tiu de kvin sekvaj lingvoj kune! Se atenti ankaŭ la aĉetpovon, la pozicio de la angla estas iom malpli supera, sed tamen klare gvida. Tamen, kiam temas pri internacia merkato, oni ne aĉetas per aĉetpove ekvilibrigita valuto, sed per reala mono, do ekzemple kultura produkto el Usono kostas principe same por loĝantoj de malriĉaj landoj kiel por loĝantoj de riĉaj landoj.

Ankaŭ surprizas, almenaŭ min, la forta rolo de la japana kaj la germana. Ili superas la hispanan, kiu tamen havas multe pli da denaskaj parolantoj. Ankaŭ la pozicio de lingvoj de kelkaj riĉaj, sed malgrandaj eŭropaj landoj estas rimarkinda. La finna, la dana kaj la norvega estas inter la 25 ekonomie plej fortaj lingvoj. Se loka aĉetpovo estas akceptita kiel bazo, pluraj hindiaj lingvoj aperas inter la 30 plej fortaj lingvoj, kvankam sen ekvilibro ilia pozicio estas marĝena.

Tamen el la listo de dek lingvoj kun plej granda nombro de parolantoj nur du, la hindia kaj la bengala, forfalas el la listo de ekonomie plej fortaj lingvoj, kie iliajn lokojn prenas la franca kaj la itala.

Rimarkinda estas ankaŭ, ke laŭ la ekonomia potenco la lingvoj de la mondo estas multe pli centrigitaj ol laŭ la nombro de parolantoj. Duono el ekonomia potenco apartenas nur la tri ĉefaj lingvoj, aŭ al kvar, se la ekonomia ekvilibro estas atentata. Krome 90% el ekonomia potenco de lingvoj apartenas al nur 20 plej fortaj lingvoj.

Konklude, la forta pozicio de la angla en la internacia scienco kaj komerco ne mirigas, se ni atentis la ekonomian fortecon de la angla lingvo. Ĝi havas malmultajn konkurantojn, kaj, nur se atenti la aĉetpovan ekvilibron, la ĉina estas la sola, kiu relative egale povas konkurenci kun ĝi. Se taksu la estontecon de la lingvoj surbaze de ilia ekonomia potenco, la ĉina estas pli verŝajna konkuranto de la angla ol la hispana, despli ke la ekonomia kresko en Ĉinio estas rimarkinda.

## UEA lanĉis retan filmjurnalon

La 15an de majo 1998 estis dissendita la unua numero de Gazetaraj Komunikoj de UEA. Precize 11 jarojn poste la populara novaĵservo ricevis aŭdvidan kunulon, kiu nomiĝas *UEA viva*. Temas pri 10-minuta filmjurnalo en YouTube kun mallongaj raportetoj pri aktualaĵoj en la vivo de UEA kaj TEJO kaj de la Centra Oficejo. Ĉiujfoje oni prezentas ankaŭ novaĵon en la Libroservo. Komence oni planas prepari *UEA viva* kun intervaloj de unu-du semajnoj.

La lanĉo de *UEA viva* estas nova paŝo en la vastiĝanta utiligo de modernaj komunikrimedoj en la agado de UEA, kiun antaŭvidis la Strategia Laborplano de la Asocio. Komence de majo UEA funkciigis retan kinejon en Ipernity, kie jam estas videblaj ok filmoj pri la programeroj de la aprila Malferma Tago kaj du historiaj dokumentoj pri la unua IJK en 1938 kaj pri IJK kaj UK en 1959.

UEA viva: <http://www.youtube.com/UEAviva>

La reta kinejo: <http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video>

## Giuseppe Pinelli rehonorita

9 maj la prezidento de la Itala Respubliko, Giorgio Napolitano, omaĝis en Romo al “ĉiuj viktimoj de sezono el malamo kaj perforto” kaj dediĉis apartan rememoron al “senkulpulo, Giuseppe Pinelli, kiu estis dufoje viktimo, unue pro tre pezaj senbazaj suspektoj kaj due pro subita, absurda fino”.



La Prezidento precizigis: “Ĉi tie ni ne volas rediskuti proceson, ĉi tie ni faras geston politikan kaj institucian, ni rompas la silenton pri vundo, ne disigebla el tiu de la dek sep kiuj perdis sian vivon en Placo Fontano, kaj pri nomo, kies honesteco estas konfirmenda kaj honorenda, preter la forigo kaj la forgeso”. Sekve li dankis la vidvinon kiu akceptis, kun la filinoj, esti en la Kvirinala Palaco por tiu ceremonio.

Giuseppe Pinelli, 41-jara, mortis 15 dec 1969 noktomeze, tri tagojn post terorisma atenco ĉe la Agrikultura Banko (en Placo Fontano, apud la absido de la milana katedralo), kie mortis dek sep personoj. Lia korpo estis trovita en la interna korto de la policejo, post falo el la kvara etaĝo, kie li troviĝis de multaj horoj, pridemandata de komisaro Luigi Calabresi kaj lia teamo. Post la morto de Pinelli, Calabresi estis la celtabulo de kampanjo akuzanta lin pri mortigo, kaj tri jarojn poste li mem estis pafmortigita de nekonatoj. Ambaŭ vidvinoj renkontiĝis hodiaŭ en Romo kaj sin salutis afable kaj respektive.

Giuseppe Pinelli, fervojisto, aktivis kiel sekretario de anarkiista klubo en Milano dum la 1960aj. En 1952 li lernis Esperanton kaj multe aktivis, precipe kiel bonvola helpanto en rutinaj kaj eĉ humilaj taskoj, en la Milana Esperanto-Klubo. Tie li renkontis ankaŭ la estontan edzinon, s-inon Licia.

Hodiaŭ Giuseppe Pinelli estas plene rehonorita de la ŝtatestro mem. La Esperantianoj profunde ĝojas pro la evento.

HeKo

## AIS: tri sesioj en ok semajnoj

Ne facilis la decido, kie okazu la ĉi-jara Sanmarineca Universitata Sesio (SUS 31) de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj, San-Marino). Estis klare, ke fine de julio okazu AIS-IKU, la Internacia Kongresa Universitato, kadre de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko. Ĉar en tiu urbo okazis jam SUS 8 kaj SUS 9, unuflanke logis la ideo, ke AIS-IKU estu samtempe SUS 31.

Pro organizaj malfacilaĵoj la senato de AIS tamen akceptis afablan inviton de la Centro Esperantista de Rimini en Italio, tie okazigi SUS-on. SUS 31 okazos inter la 7a kaj la 11a de septembro en la ĉemara kvartalo San Giuliano Mare.

La Esperanto-centro en strato Briolini jam estas konata al multaj AIS-anoj, ĉar tie okazis SUS 30 du jarojn antaŭe. La koncentrado de la SUS-programo al kvin tagoj eble donos al kelkaj SUS-anoj okazon, antaŭe aŭ poste pasigi agrablan semajnfinojn ĉe la adriatika plaĝo de San Giuliano.

Ĉar AIS ne estas ŝtate agnoskita en Italio, la ekzameno okazos en proksima San-Marino, la naskiĝlando de AIS.

Aldone AIS aranĝos trian sesion en la 42a ILEI-konferenco, kiu antaŭ UK okazos en Krakovo. Ĝi ebligos al studentoj, kiuj malfacile aŭ ne povas vojaĝi al Rimini, la partoprenon en ekzamenoj. Tiel AIS ene de ok semajnoj okazigos tri sesiojn.

Legu pli: [www.ais-sanmarino.org](http://www.ais-sanmarino.org)

GK UEA

Reinhard Fossmeier

## Prikomputila blogo en Esperanto

Por la neretemaj legantoj, kiujn eble surprizas la vorto “blogo” en la titolo, necesas precizigi, ke blogo estas reta raporto aŭ taglibro. Blogoj estas lokitaj en la Interreton kaj preskaŭ ĉiam en la TTT. Blogoj enhavas liston de eroj (blogaĵoj aŭ blogeroj), kiuj ordinare estas laŭtempe ordigitaj kaj temas pri la ŝatokupoj, religio, politikaj kredoj, okupo, k.t.p. de la bloganto. Blogoj kutime (sed ne ĉiam) permesas por legantoj komenti la erojn.



La vorto “blogo” devenas de la samsignifa angla vorto “blog”, kiu estiĝis el mallongigo de la vorto “weblog” (TTT-protokolo). Kelkaj esperantistoj preferas la ne-neologismajn esprimojn “reta taglibro” aŭ “TTT-protokolo”.

Malofte aperas eĉ la formo “trototolo”, kiu estas ia sintezo de “TTT” kaj “protokolo”. La neologismo “blogo” plifaciligas la uzon de derivaĵoj kiel “blogi”, “blogaĵo” kaj “bloganto”, kiuj estas malfacile esprimeblaj surbaze de la peza esprimo “virtuala taglibro”.

Kaj nun — pri la projekto mem. La celo de la nova projekto de la organizo E@I (<http://blogu.ikso.net>) estas liveri interesajn novaĵojn pri la komputilaj aferoj en Esperanto en la formo de blogo en interreto.

En la nova blogo eblas informiĝi pri diversaj aferoj, rilataj al komputiloj kaj modernaj teknologioj ĝenerale (interreto, programaro, grafikajoj...). Nur se la lingvo estas vere uzata en ĉiuj eblaj vivosferoj, ĝi povas montri sian efikecon kaj taŭgecon. Tial la blogo ankaŭ celas vastigi la fakan uzadon de Esperanto inter esperantistoj, rilate al prikomputilaj vortoj kaj temoj. Do eblus diri, ke kroma celo de la retejo estas ankaŭ eduki publikon pri faka terminologio (ofte malĝuste uzata far ĝenerala esperantistaro). Kaj krome, ja estas certe utile kunigi homojn kun samaj aŭ similaj interesoj ĉirkaŭ iu specifa projekto aŭ celo; do por komputilemaj kaj ĝenerale scivolemaj homoj pri modernaj teknologioj ekestis bona “nesto” por kunlaboro.

E@I-teamo bonvenigas komputilemajn verkemajn kunlaborantojn, kun bona lingvo-kono por kontribui al la paĝaro per interesa enhavo. Kaze de interesiĝo skribu al [peter.balaz@ikso.net](mailto:peter.balaz@ikso.net) aŭ al [jevgenij.gaus@ikso.net](mailto:jevgenij.gaus@ikso.net)

La paĝar-adreso estas: <http://blogu.ikso.net>

Nun estas preparataj kelkaj specifaj projektoj pri specifaj temoj kaj fakoj, nome: instru- kaj helpo-paĝo pri kreado de blogoj kaj paĝaroj kaj retejo pri filmoj kaj subtekstigo. Ilin ni prezentos en iu el postaj numeroj de *La Ondo*.

Peter Balaz



## Denove pri participoj

De longa tempo, tre estimata Geraldo Mattos, vi provas precizigi la uzadon de tiuj “diablecaj” vortoj de nia lingvo. Provas... sed ne ĉiam sukcesas: mi ne estas sola jesanto, ke kelkfoje viaj asertoj ŝajnas dubindaj kaj via argumentado nekomprenbla.

Male en la marta numero de *La Ondo* vi tre klare indikas:

“Se *mortinta*, *mortinte* kaj *mortinto* estas senescepte post *morti* kaj *portita*, *portite* kaj *portito* estas senescepte post *porti*, ni devas konkludi, ke la estinta participo ĉiam indikas la tempon post -i, kaj neniam la tempon dum -i!..”

Bonege. Sed kial vi opinias, ke oni devas transformi la unuan ekzemplon:

“[...] EU baldaŭ havos plian lingvon, [...] post kiam estos atingita fina akordo [...]” al [...] atingata [...].”

Laŭ vi mem ĉi-supre, *atingita* = post atingo; nu, estas ĝuste la kazo: la havo de nova lingvo povas nur veni post atingo de akordo... Aŭ ĉu vi intencas diri, ke *post* en la ekzemplo estas pleonasma, kaj ke oni simple diru: [...] *kiam estos atingita* [...] sen *post*?

Krome el via ĉi-supre citita bonega kvazaŭregulo, oni logike rajtas eltiri:

“Se X-ant- estas senescepte dum X-i, kaj Y-at- estas senescepte dum Y-i, ni devas konkludi, ke la estanta participo ĉiam indikas la tempon dum -i”

Mi sekve akceptas vian opinion en la dua ekzemplo.

Sed en la tria mi opinias, ke tiuj kiuj konsentis, povas nur esti *debatintoj*, kaj ne *debatantoj*: *debatantoj* ne povas konsenti, ĉar ili ankoraŭ debatas; kiam ili fine konsentos, ili tiam ne plu estos *debatantoj*, sed *debatintoj*.

Fine en la kvara ekzemplo mi opinias kun vi, ke devas esti *interesatoj*. Oni eĉ povas aldoni, ke *interesotoj* ankoraŭ validas, apud *interesatoj*, kun la senco de estontaj *interesatoj*.

Johan<sup>2</sup>-Luko Tortel

La 15an de februaro en Terrassa forpasis

### Giordano Moya Escayola (1913–2009)

esperantisto ekde 1933, aktivulo en la hispania Esperantomovado, aŭtoro de *La homa viva aventuro* (1987), *Esperanto en prospektivo* (1989), *Survoje al universala civilizacio* (1995), *Esperantismo* (2002).

La 27an de marto en Doneck forpasis

### Nikolaj Nikitoviĉ Starodubcev (1938–2009)

sciencisto, elstara ukraina heraldikisto, membro de pluraj heroldikaj societoj, esperantisto ekde 1962, dum pli ol 20 jaroj prezidanto de la Donecka Esperanto-klubo. En 1996 aperis lia plurlingva *Ilustrita vortaro pri heraldiko*.

La 2an de aprilo en Rigo post longa malsano forpasis

### Aristids Medinš (1944–2009)

multjara aktivulo de la Sovetunia kaj de la Latvia Esperantomovado, organizinto de pluraj Esperanto-aranĝoj, gvidinto de la Esperanto-klubo *Radieto*, UEA-delegito en Rigo.

La 10an de aprilo forpasis en sia 99a vivojaro

### Kurusu Kei (1910–2009)

tradukanto el la ĉeĥa en la japanan, esperantisto ekde 1930, aktivulo de la Japano Proleta Esperantista Unio, Honora Membro de UEA ekde 1991. Li tradukis el Esperanto en la japanan *La danĝeran lingvon* de Ulrich Lins (1975) kaj *Tempesto super Akonkagvo* de Tibor Sekelj (1990).



# Rememoraĵoj pri la unua tempo de Esperanto

de Petro Stojan



Bernard Golden proponis neologismon *stojani* kun la signifo: “Agi kiel Petro Stojan, kiu, estinte vigla Esperantisto, iom post iom alprenis kontraŭesperantajn vidpunktojn kun la rezulto, ke li finfine fariĝis malesperantisto sed ne tute forlasis la movadon” (*Literatura Foiro*, 1981, N<sup>o</sup>70, p. 13). Sed Stojan havis ankaŭ multajn meritojn, inter kiuj elstaras lia monumenta *Bibliografio de Internacia Lingvo* (1929).

Represante lian artikolon, kiu aperis en la ĉeĥa revuo *La Progreso* en 1927, ni kontribuas al nia zamenhofologia sekcio kaj samtempe omaĝas al Pjotr Jevstafjeviĉ Stojan en la jaro de lia 125a naskiĝdatreveno. Ĉi tiu represo iĝis ebla danke al la afabla helpo de Miroslav Malovec, kiu skanis la tekston kaj la foton kaj sendis ilin al ni. Ni korektis en la teksto nur la Zamenhofajn citaĵojn, la plej krudajn mistajpojn kaj iom unuecigis la interpunkciadon.

La notoj aperos venont-monate post la fino de la artikolo.

## I.

Tre ofte okazas ke la publiko, konante la famulojn nur per iliaj verkoj aŭ el priiliaj artikoloj, naive imagas al si, ke ili estas mirindaj superhomoj, ĉiel neordinaraj, kiuj spiras, marŝas, dormas — tute alie ol la “ordinaraj” homoj — kiuj preskaŭ havas blankajn flugilojn sur la dorso, ian aŭreolon ĉirkaŭ la kapo... Kaj, ve al la famulo, se li proksimiĝos al tia naiva publiko: tuj li perdos sian ĉielecan aŭreolon, tuj la publiko elreviĝos, perdos sian entuziasmon, murmurante “ba, li tute ne estas tia, kian ni lin imagis, tia... ideala, bela, dieca... li estas vulgara homo, tute neinteresa, proza, malbela, kun ĉiuj mankoj de nia societo... kaj nun liaj verkoj ŝajnas al ni en ilia vera valoro, t.e. verkaĉoj de ĉarlatano aŭ de frenezulo, kies cerbo ne estas pli alta ol la nia”.

Ni avertas la leganton ke ĉi tie li ne trovos tiun poezian nebuleton, tiun ornamitan kaj pian elpensajon, kiu tradicie troviĝas en la “historiaj” kaj “kritikaj” verkoj pri iu geniulo, famulo aŭ movado. Nenion grandiozan, mirindan, heroecan trovos ĉi tie la leganto. Rekompenca, ni garantias ke ĉiu detalo, ĉiu bagatelaĵo, rakontita ĉi tie, estas reala fakto, aŭ senpere konita, aŭ ĉerpita el rakontoj de kelkaj pioniroj, kiuj

esperantiĝis en 1887, 1888, 1889 kaj 1890. Tre malofte, iu fakto estis kontrolita aŭ ĉerpita el originalaj fontoj, ekz. el la unuaj gazetoj, el Zamenhofaj personaj leteroj (ekz. la kolekto da 115 leteroj de Zamenhof<sup>1</sup> skribitaj 1887–1910, kiujn ni konsultis ĉe la “Espero”, la unua esperantista societo en 1891).

Malserenis pluveta tago, 15 (2) dec. 1912, kiam varmeta vento, blovata de Balta maro, moligis la neĝon kovrantan la rusan ĉefurbon: malpure flava neĝkوتاĵo formiĝis en la stratoj, kvazaŭ tra kribrilo ŝutiĝis malvarma pluveto. En lecionejo de la Universitato kunvenis trideko da studentoj, plejparte anoj de la Esperantista Grupo (SEGU) por solenigi la naskiĝan datrevenon de Zamenhof. Parolis unue prof. Boduende-Kurtene’ (Baudouin de Courtenay<sup>2</sup>), la fama en slavaj landoj lingvisto, amiko de la mondlingva ideo. Li komencis jene, per sia saltetanta neklara kaj nelaŭta voĉo: “Multaj sin ĝenas parolante pri la aŭtoro de Esperanto, ne kuraĝas malkaŝe sin esprimi, maskas la faktojn, kvazaŭ hontante... Nu, mi diros al vi, tute simple... Zamenhof estas pola judo, jes, pola judo...” La lingvisto tie aŭdigis la popolan vorton “jid”<sup>3</sup>, kiu sonas krude por oreloj de rusaj intelektuloj. Verŝajne, per tiu oratora procedo,

la lingvisto intencis moki pri tiuj, kiujn ŝokas la fakto, ke nia majstro apartenas al juda popolo.

Kaj, tiel, rememoriĝas la unuaj jaroj de Esperanto, kiam multaj, tre multaj rusaj pioniroj, pro la taktikaj motivoj, ne nur kaŝis la fakton, eĉ konstruis komplikitan legendon<sup>4</sup>, laŭ kiu Zamenhof estis “luterano”, kies baptonomo estis “Ludoviko”, kies patro estis “Marko”... aliaj informis, ke Zamenhof portis nomon “Lazaro”, estis protestanto. Kiam la rusa registaro kaj kortego estis antiŝemidaj (judofobaj), kiam la cenzeno suspektis ĉion kio iris de “indiĝena”, precipe juda, tendaro, tiam estis iomgrade pravigebla, aŭ almenaŭ komprenebla, la sistema “pia mensogado”. Nun ni havas la precizajn informojn pri nia majstro, kiu naskiĝis en juda familio, estis laŭleĝe cirkoncizita (baptita laŭ moseana rito), kaj en 1917 enterigita en juda tombejo de Varsovio. La oficialaj registroj de Bielostok enhavas enskribon pri “Lejzer Zamenov” filo de “Mordka”<sup>5</sup>.

La unua libreto pri nia lingvo estis presita sub pseŭdonomo “Dro Esperanto”. Vladimir Majnov<sup>6</sup>, rusa policeja oficisto, esperantisto de la unua jaro, multe klopodis por malkovri, kiu estas kaŝita sub la nomo “Dro Esperanto” kaj estas nun dolorige legi la korespondadon inter “Dro Esperanto” kaj Majnov — pri tiu delikata temo. Ne ĉiuj unuaj pioniroj estis homoj diskretaj kaj bonedukitaj, kaj Zamenhof iufoje estis torturata de siaj disĉiploj, ne nur tro fervoraj, sed ofte trudemaj, sentaktaj. Tiu sama Majnov (kiu senrajte aldonis al sia nomo vorteton de: V. de Majnov) poste elpensis aliajn aferojn, kiuj denove ekturmentis nian kompatindan majstron. Nome, Majnov volis altrudi nian lingvon al la membroj de la Cara Familio, al la grandaj dukoj, al la korteganoj, tute simple — per la “fidelregatecaj”

donacoj de esperantaj libroj, per la aŭdiencoj, ktp. Zamenhof klare vidis la danĝeron: sensignifa junulo, malalta polica oficisteto (Majnov), kiu trudpenas penetri en la Kortegon por... donaci al la Caro, Carino, aŭ al aliaj Membroj de la Dinastio... donaci kion? — malgrasan gramatikon de la Lingvo Internacia, mizere presitan... La honta fiasko de Majnov, certe ne akceptota en la Kortego, devus — laŭ la opinio de Zamenhof — ĵeti ridindan makulon sur Esperanto mem. Do, nia tiam juna majstro faras ĉion eblan por konvinki Majnov-on pri la neoportuneco, danĝereco de tia paŝo...

Koro premiĝas legante la liniojn, paĝojn, kie Zamenhof kun ĉagrena tono retenas la maltaktan disĉiplon de la era paŝo. La leteraro ne montras kiel finis la vea entrepreno (en la kolekto mankas la finaj leteroj), sed poste aperas alispeca artifaĵo de Majnov: “Renaskita Manfred” de K.R. (Konstantin Romanov, onklo de la Caro) tradukita kaj presita en 1891. Eĉ se la verko ne estus 18-paĝa broŝureto, ĝi estu eĉ volumego, tio nenion pruvus, neniel konvinkus la Altrangulojn.

Dudek jarojn poste, la malbona genio de rusaj esperantistoj, A.P.<sup>7</sup>, juste punita je dek jaroj da malliberejo pro iu krimo, ankaŭ entreprenis similan “propagandon”, kiu nenion utilan alportante, ĵetis nur makulon de malnobla servuteco sur tiujn, kiuj rampis ĉe la piedoj de la Altranguloj.

Alia kategorio da “pioniroj” alimaniere turmentis, pliofte tedis, nian majstron: estis tiuj kiuj kredite mendis de li lernolibrojn, kaj poste neakurate, nevolonte — aŭ eĉ tute ne — pagis siajn ŝuldojn. En la kolekto troviĝas poŝtkartoj kaj leteroj de Zamenhof, en kiuj ni legas unuformajn enuigajn kalkulojn: tiom da tio... tiom da kopekoj, rubloj, pfenigoj, markoj, centimoj, frankoj... La sumoj plej ofte estis bagatelaj, plorinde etaj; sed ĉirkaŭ 1910 ekzistis pluraj “samideanoj”, kiuj ŝuldis al la “kara majstro” sumojn je centoj da rubloj, kaj neniam poste ili senŝuldiĝis. Inter ili estis prezidanto de la granda nacia Ligo.

Ni vere nun rompas al ni la kapon, por diveni, por iomete kompreni, kiel povis ekzisti “samideanoj”, kiuj harmoniigis en sia menso tiajn du malakordajn tendencojn, kiaj ja estis, unuflanke, la entuziasmo de l’ pioniroj, apostolado, varmaj paroloj pri nia sankta afero, verda standardo, kunfratiĝo de la popoloj... kaj, aliflanke, la senhonta ekspluatado

de la bonkoreco de Zamenhof, la tedado, nehonesta mendado, ktp.

Ni scias kiom ofte Zamenhof skribis pri siaj ĉagrenoj, elreviĝoj, koraj doloroj. Oni ordinare tion entrepretis kiel sekvon de la ŝovinismo, kiu furiozis en la hejmlando de Zamenhof, kiel sopiron al la nerealiĝintaj idealoj, sed... la unuaj kaŭzoj estis multe pli simplaj, proksimaj, prozaj: tio estis la malindaj “samideanoj” kiuj, kvazaŭ instigataj de ia sataneca sentrankvilo bombardis la majstron per siaj trudaj, maldiskretaj, postulegaj leteroj, kaj se li respondis, ili implikis lin en senfinajn absurdajn diskutojn, kalkulojn, fientreprenojn, el kiuj la majstro apenaŭ povis elturniĝi, verŝajne sopirante: “Ho, Dio, liberigu min de miaj amikoj...” La bedaŭrinda trajto de Zamenhof estis lia malforta karaktero en rilatoj kun la homoj. Sola, li estis pacienca, laboreganta, obstina, rezista, sed en la socio li ne havis la energion por turni la dorson al la trudemuloj, arogaj tipoj... Li volis esti afabla kun ĉiuj, kaj eble tio estis fatala eraro, de kiu ankoraŭ nun suferas nia movado. Ja kreiĝis pro tio la tradicio, laŭ kiu oni anatemas tiujn kiuj laŭte krias, postulas, protestas, sen morala rajto al tio. Dume, la modestaj laborantoj, veraj bazoj de nia movado, oferas, oferegas, restas en la ombro, kaj neniu aŭdas ilian voĉon, kiu estus valora en la momentoj de grava diskutado. Dank’ al la bonkoreco de Zamenhof nia movado estis viktimo de la laŭte reklamantoj, anstataŭ esti metode kaj prudente gvidata de la senbrujaj laborantoj.

## II.

La plej interesa letero de Zamenhof, kiu estas en la kolekto de la “Espero”, datita 1889, enhavas la konfeson, kiu ĵetas neatenditan lumon sur la historion de nia lingvo. En tiu letero la aŭtoro diras ke li kreis la lingvon — unue kaj ĉefe — por sia malfeliĉa popolo, dividita inter multaj landoj kaj lingvoj, popolo, kiu povos ree esti unuigita dank’al la lingvo. Tiu popolo povus esti apostolo de la lingvo internacia, pro sia tutmonda rolo kaj pro siaj historiaj tradicioj. Kun



la lingvo venus la nova religio (Homaranismo, aŭ Hilelismo) kiu fine fariĝus la tutmonda religio.

Do, la amo al sia popolo, la naciismo, estis ĉefa movilo por Zamenhof, kiu aldonas en la sama letero: se mi ne estus firme kredanta ke la nova religio triumfos, mi neniam publikigus la lingvon, kiu estas nur la rimedo, ne celo. Ni resumu la leteron: La homaro bezonas la novan religion. Tiu religio bezonas sian lingvon kaj siajn apostolojn. Do, kreiĝas por tiu celo Esperanto, kaj estas fatale destinita por la apostoleco la popolo de Zamenhof.

Nun, la ĉefaj himnoj kaj poezioj de Zamenhof aspektas en ilia vera rolo, kaj la esprimoj “nova sento”, “nia sankta afero”, “la celo”, ktp. povas esti komprenataj en ilia vera senco. La okcidentaj pioniroj, pro nesufiĉa informiteco kaj pro sia limigita mentaleco, neniam povis kompreni la ideojn de Zamenhof, kiujn ili malklare nomis “la interna ideo”<sup>8</sup>. Tiu nomo estis uzata ankaŭ de Zamenhof, sed en tute klara senco, tamen nekaptebla por la okcidentuloj.

Kiam oni skribas pri la Zamenhofaj ideoj: kunfratiĝo de la popoloj, homa familio, homa egaleco sendependa de la lingvo, raso, religio, — oni diras ĝuste, sed nekomplete, dum la intima programo de Zamenhof estis tute klara, konkreta, palpebla. Sed Zamenhof ne estis komprenata de tiuj, kiuj fieris esti liaj disĉiploj, kiuj pretendis paroli la klaran lingvon, kreitan por la tutmonda interkompreno.

Kiam la koroj malsamas, la lingvo komuna, eĉ patrin-lingvo, ne kapablas igi kompreni. La tragedio de Zamenhof, la ĉefa kaŭzo de liaj moralaj suferoj, estis la fakto ke oni lin ne komprenis, ne volis kompreni, ke oni krude malakceptis liajn “ideojn”, ke oni limigis la aferon al la nura Esperantismo: “Oni ne devas intermiksi — skribas Zamenhof en sia homaranisma programo — la homaranismon kun la esperantismo. Ambaŭ ideoj estas tre parencaj inter si, sed tute ne identaj”<sup>9</sup>.

Kiel ĉiuj fondintoj de religioj, ankaŭ Zamenhof kreis dogmojn, kiujn ĉiu estis libera akcepti aŭ ne, sed ne diskuti: “La homaranoj estas konvinkitaj, ke ili staras sur fundamento de absoluta vero, kiu pli aŭ malpli frue *devos* venki...” kaj kelklinie poste: “La homaranismo, bazita ne sur tempaj politikaj kondiĉoj de la vivo de tiu aŭ alia gento, ne sur elpensitaj religiaj dogmoj, ne sur tempaj modaj doktrinoj kaj fluoj, sed sur vero



absoluta, ĉiuloka kaj ĉiutempa...”<sup>10</sup> Pro la taktikaj motivoj, niaj propagandistoj substrekas ke Esperanto celas fariĝi nur helpa lingvo, kiu tute ne volas anstataŭi la naciajn. Sed tia ne estis la penso de Zamenhof kaj de liaj disĉiploj: “La homaranoj esperas, ke per konstanta reciproka komunikiĝado sur la bazo de neŭtrala lingvo kaj neŭtralaj religiaj principoj kaj moroj la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale-homan popolon...” Oni ne povas diri pli klare ke temas pri estonta lingvo de la homaro, sola, unika, kiu floros sur la ruinoj de la kadukiĝaj naciaj idiomoj. “...mian lingvon mi ne rigardas kiel mian idolon kaj ke mia idealo estas lingvo neŭtrale homa (Esperanto)”.

Relegu la himnon, atente relegu, kaj eble vi komprenos ke ĝi esprimas sincerecajn sentojn kaj aspirojn, ke ne nuraj frazoj ĝi estas. Kaj kia abismo — inter tiuj, kiuj ĝin kantas konvinke, elkore, kun konscio ke ilia vivo harmonias kun la paroloj de la himno, — kaj tiuj, kiuj ĝin mekanike ripetas, (pro falsa formal-eco, ĉar ili adoras aliajn idolojn: ŝovinismojn, egoismojn, ambicion kaj oron).

Ni konas historion de Bramanismo kaj Budhismo, kiuj unue estis altaj doktrinoj de la superhoma perfekteco, sed kiuj iom post iom fariĝis ludiloj kaj monakiriloj en la manoj de “praktikaj” personoj, ĝis la nuna abomena idolana stato. Tio signifas ke la plej bonaj kaj belaj aĵoj, en la manoj de la “laikoj” iĝos la plej ordinaraj, vulgaraj, profanaĵoj.

Nu, dum sia longa martirvojo Zamenhof vidis, kiel nia sankta afero — de mano al mano — transiras al pli kaj pli “praktikaj” personoj, por kiuj la interna ideo, la amo, la vero, ktp. ekzistas nur kiel sociaj konvenciaĵoj, similaj al la neĝe-blankaj kolumoj, vizitkartoj, nobelaj titoloj, sub kiuj kaŝas sin plej vulgare apetito por materiaj ĝuoj kaj plej ordinara egoismo, kapabla piedpremi, se el tio sekvas profito, la amikecon, fidelecon, justaĵon.

Se ni kredus al kelkaj propagandistoj de Esperanto, tiu hipokriteco estas necesa kiel la sola praktika taktiko, ĉar — por altiri ĉiam novajn amasojn da adeptoj, estas tute necese ke ili vidu la idealismon de la tuta Esperantista Popolo.

Ni povas konsenti ke tiu taktiko estas utila kaj profitiga por kelkaj apartaj personoj, por kelkaj komercaj ejoj, sed ni energie neas ĝian utilecon por nia afero mem. “...ĉiuj kompromisoj estas maljustaj kaj nefortikaj...” (Zamenhof).

### III.

La tempo, kiam aperis Esperanto, estis plej feliĉa epoko de Volapük. Konsiderante ke en tiu tempo ekzistis dudeko da volapükistaj gazetoj, ke en iliaj kongresoj partoprenis po 100–200 aliĝintoj, ke ilia literaturo nombris apenaŭ 400 eldonaĵojn, enkalkulinte tie ankaŭ lernilojn, oni povus taksii tiaman nombron de volapükistoj je 2 aŭ 3 mil. Kaj tamen iliaj propagandiloj parolas pri milionoj... Similan trograndigon faris la apostoloj, laŭdante geniecon de Schleyer, lian scipovon de 67 (kaj poste 89) lingvoj! La pariza profesoro A. Kerckhoffs<sup>11</sup>, la dua post sia majstro — specialisto pri Volapük, tiel skribis en 1886: “Un polyglotte étranger, M. Schleyer de Constance, à la fois homme de lettres et linguiste distingué, est enfin parvenu, après vingt ans de laborieux efforts, à résoudre le difficile problème”. (Fremda poligloto, S-ro Ŝlejer el Konstanco, samtempe literaturisto kaj distinginda lingvisto, fine sukcesis post dudek jaroj de laboremaj penoj solvi la malfacilan problemon.) Nu, Ŝlejer mem konfesis ke la ideo krei mondlingvon venis al li dum unu sendorma nokto en marto 1879; unu jaron poste, la lingvo jam estis finpretita! Ni devas vere miri pri la deklaro de Kerckhoffs, ke Volapük estis frukto de 20-jara laboro, kiam la aŭtoro mem konfesis, ke li tion faris dum unu jaro.

Alia ridinda deklaro de volapükistoj estis, ke ilia lingvo superas ĉiujn lingvojn de la mondo laŭ la riĉeco, beleco, esprimpovo. La apero de Esperanto estis forta bato por volapükistoj, kies parto tute seniluziigis pri la mondlingvo, alia parto restis fidela — obstine kaj konsternite, kaj tria parto forlasis la movadon por tuj aliĝi al la nova promesoplena junlingvo “Lingvo Internacia” de Zamenhof.

Inter eks-volapükistoj kiuj iĝis fervoraj esperantistoj ni notu: Leopold Einstein, Auguste Demonget, E. de Wahl, W. Trompeter, Vladimir Ŝmurlo, Chr. Schmidt, Dro Mybs, A. Semizorov, Dro Lederer, John Ellis.

Ni povas taksii la morton de la volapüka movado proksimume en 1893, ĉar poste ĉesas la gazetoj, novaj eldonoj, kongresoj. Vere, grupeto da fideluloj restas, apud la majstro, kun la sola gazeto “Volapükabled Lezenodik”, kiu daŭris ĝis la morto de Ŝlejer, en 1912. Ni havas sub la mano lastan dikan libron eldonitan en Volapük: “Grammatica

Comparata del Volapük e Vocabolario Italiano-Volapük e Volapük-Italiano, di Maria Tommasi. Milano 1889–1890”. in 16° 1216 paĝoj. Sur la lasta kovrilo ni vidas blazonon de volapükistoj: ŝildo kun kvar partoj kiuj entenas literojn MBPB (Menadé bal püki bal), sespintan stelon, kvinpintan floron, ankron; la ŝildo estas ĉirkaŭita de rubando kun la nomitaj kvar vortoj (kiuj signifas: “al unu homaro unu lingvon”). Super la rubandita ŝildo estas reĝa krono aŭreolita de hirundo portanta en la beko leteron. Sub la ŝildo estas du sinpremantaj manoj, kaj finsube la terglobo.

Sed tiu luksa kaj simbolabunda blazono ne povis revivigi la lingvon, kies sorto decidiĝis en la momento, kiam aperis nia lingvo; same ne povis savi Volapükon la luksaj libroj, lernolibroj en 89 (?) lingvoj, ktp. Estinta volapükisto, W. Rosenberger<sup>12</sup>, la aŭtoro de “Reform-Neutral” iufoje rakontis al la anoj de la petrograda societo “Kosmoglotto” ke en la du unuaj volapükistaj kongresoj oni parolis nur germane, pro la malfacileco de la lingvo. Kaj kiam Rosenberger vizitis sian majstron en Konstanco, tiu ne volis respondi al li en Volapüko, sed proponis: “Ni, plibone, parolu germane...”

Nun ni ridetante konsideras tiun lingvon, kiu estis iam la konkuranto por la nia. Sed en la unuaj du-tri jaroj niaj pioniroj serioze timis Volapükon, troimagis ĝian forton, troprenadis ĝin kontraŭbatali. Kiel unu el la pruvoj pri tiu timo kaj malamikeco al Volapük restas serio da artikoloj kiujn verkis Zamenhof<sup>13</sup> en la unua gazeto “La Esperantisto” 1889–90. Ni vere nun miras kiom da ironio, mokemo, kontraŭargumentado, eĉ da maljusta traktado elspezis tiam juna aŭtoro de nia lingvo; tiu artikolo pruvas ankaŭ, ke ne ĉiam Zamenhof estis trankvila, sindetena, tolerema, kiel lin prezentas al si la nova generacio da esperantistoj. Cetere, li ja mem skribis en sia unua libreto (1887): “Ho mia kor’, ne batu maltrankvile...” kaj la konata trankvila ekstero, kiun konas ĉiu vidinto la majstron, ordinare kaŝis internan emociadon, suferon aŭ malgajon.

Daŭrigota

La 30an de julio 2009, jaŭde, la redaktoro de *La Ondo* prelegos kadre de la Esperantologia Konferenco en Bjalistoko pri aktualaj problemoj de zamenhofologio.

## La revuo *Esperanto*

La revuon *Esperanto* fondis en 1905 la franca esperantisto Marcel Paul Berthelot. La unua numero aperis 18 jun 1905 en C eret (orientaj Pireneoj). Charles Lambert estis la redaktoro. N 21 estis publikigita 5 a g 1906 kun la administra adreso en  enevo/Bellgarde dulingve en Esperanto kaj la franca.

Post la malapero de Berthelot en Sudamerikon la gazeton transprenis Hector Hodler en  enevo. Preferataj temoj tiutempe estis la ideo pri la konsuloj kaj konsulejoj, disvastigo de Esperanto en komerco, scienco, armeo, eklezio, pacifismo, studentaro. Aperis landa kroniko, literatura felietono, anka  politikoj. La gazeto plurfoje  angis siajn pa onombron kaj formaton. Per sia 31a numero *Esperanto* fari is la oficiala organo de UEA, starigita en aprilo 1908 en  enevo. Dum la mondmilito Hodler aperigis siajn elstarajn artikolojn *Milito kaj homa energio* kaj *La pacproblemo: Novaj vojoj*. Hodler volis pruvi, ke la lingvo kaj movado Esperanto estas intime ligitaj kun la pacproblemo.

Post la frua forpaso de Hector, en 1920 Edmond Privat da rigis la redaktan kurson de sia forpasinta kolego. Sed anstata  tro da longspiraj artikoloj pri pacismaj, socipolitikaj kaj socialaj temoj, kiujn Hodler  atis trakti en plena longeco, la  urnalisto Privat preferis mallongajn enkondukajn tekstojn pri konkreta temo. Aparta atento estis atribuita al movadaj kaj lingvaj temoj, al internaciaj kongresoj kaj al la evoluo en Ligo de Nacioj. Privat en la 1930aj jaroj komprenis la forti on de la naciismo kaj ne hezitis beda ri tion sur la pa oj de *Esperanto*.

Kiam en 1934 en Stokholmo Privat ne estis reelektita en la komitaton de UEA, aperis redakcia vakuo, kiun en 1935 provizore plenigis Robert Kreuz. Per la decido transloki la Centran Oficejon de UEA el  enevo al Londono kaj per la anonco de generalo Bastien en 1936 pri fondo de la Internacia Esperanto-Ligo (IEL) la internacia Esperantomovado disdui is. Dum IEL lan is novan periodaĵon *Esperanto Internacia* ( in redaktis Teo Jung, Cecil Goldsmith kaj Mason Stuttard), la malnova UEA kun sia tradicia *Esperanto* restis kun Hans Jakob en  enevo. Intertempe la Dua Mondmilito eksplodis. En 1940 Jakob trovis lokon en Palais Wilson, kie li da rigis la eldonadon de *Esperanto*. Post la reunui o de UEA kaj IEL en 1947 Jakob da rigis la redaktadon de



*Esperanto*.  ar tuj post la Dua Mondmilito komenci is la Malvarma Milito, Jakob ne hezitis de tempo al tempo komenti tiun novan tragedion inter Oriento kaj Okcidento. Ekde N 542 (1951), sekve de enketo inter la legantoj, oni  angis la grandecon de la gazeto al la populara formato de la *Digest*-kajeroj. Kiam fine de 1954 estis akceptita la fama Esperanto-rezolucio de Unesko en Montevideo, la organo de UEA re his per vastaj klarigoj pri  i. Sed en la jaro 1955 venis la fino por Jakob. La julia numero estis lia plej lasta, kaj la respondeco por la gazeto transiris al la skota literaturisto William Auld.

En novembro la Centra Oficejo de UEA transloki is de Britio al Roterdamo, kie la revuo onte estis redaktata. Sub la nova redaktoro la revuo radikale  angis sian aspekton kaj koncepton. Koloraj kovriloj estis enkondukitaj. Literaturo ricevis pli da atento. Alia novaĵo estis la enkonduko de la rubriko *La Juna vivo*, kiu respegulis la kreskantan agadon de la esperantista junularo. La redaktoreco de Auld ne estis longa. La numerojn inter septembro 1958 kaj decembro 1960 redaktis s-ino Kirsten Zacho en parta kunlaboro kun H.V. Rasmussen en Danlando. En januaro 1961 reaperis Auld, kiu respondicis pri la numeroj  is novembro 1962. En 1960 estis enkondukita nova grafika koncepto.

La 38-jara Auld forlasis la redaktorecon kun "miksitaĵ sentoj". Unu kialo por lia demisio estis, ke la komunikado inter Skotlando kaj Nederlando, kie trovi is la presejo, ne montri is oportuna. La redaktadon transprenis la nederlandano Victor Sadler, naskita kiel brito en 1937. Multaj defioj atendis lin,  ar la asocio kreskis, kaj kun  i la diskutoj kaj

problemoj. Vastan atenton sub Sadler trovis la agado ekster E ropo kaj lingvaj demandoj. Apud la aktivismo de Lapenna, ekde 1964 prezidanto de UEA, multi is kritikaj vo oj kontra  malfavoraj tendencoj, pri stagnanta agado, pri nesufi e alta kvalito kaj pri indiferenteco al la sorto de Esperanto. La problemoj, kiujn Lapenna havis kun la movado, kaj la problemoj, kiujn la movado havis kun li, kondukis finfine al lia eksi o el UEA en 1974.

Sadler demisiis kiel redaktoro sed restis direktoro de la Centra Oficejo, poste  enerala direktoro de UEA  is 1983. Ekde 1974 sub la nova redaktoro Simo Milojevi , bosnia  urnalisto laboranta en la Centra Oficejo, kaj prezidanto Humphrey Tonkin, oni celis reatingi ian normalecon. Rapida estis la kresko de Esperanto-agadoj en la socialismaj landoj kaj en Azio, kie ekzemple en Irano kaj en Hinda Unio Esperanto iom ekfuroris. Sub Milojevi  la revuo ricevis modernan aspekton kaj profesinivelan redaktadon kun varia kaj interesa enhavo.

Sadler reti is post sia 20-jara servo. Ekde 1 maj 1984 Milojevi  fari is  enerala direktoro de UEA, kaj Geoffrey Sutton akceptis la taskon kiel nova redaktoro de *Esperanto* por 1984–1986. Sed balda  la redaktadon devis transpreni Osmo Buller, Milojevi  kaj Mark Fettes. La  i-lasta dum 1987–1991 klopodis da rigi la tradicion de la revuo, donante emfazon al lingvopolitikaj temoj. Li montri is sufi e lerta kaj enga ita redaktoro, kiu kapablis levi la  eneralan intelektan nivelon kaj enkonduki personan akcenton. En 1990 la revuo *Esperanto* ricevis freŝan grafikan aspekton, kaj la titolo ricevis novajn litertipojn.

Kiam Fettes demisiis, inter 17 kandidatoj estis elektita la hungaro Istv n Ertl. Sian intelektan talenton kaj emon al literaturo li pruvis senprokraste en 1992 per la speciala numero al Gaston Waringhien, kiu forpasis en decembro 1991. Kiam en januaro 1993 mortis Juan R gulo Perez, Ertl pretigis elstaran eldonon dedi e al tiu eminentulo. Liaj intervjuoj kun Martinet, Eco, Selten, Nemere vekis la intereson de la legantoj. La ambicio de Ertl estis la senripro a lingvaĵo. En januaro 1995 *Esperanto* ricevis renovigitan veston. Nu, la bona volo trakti  iujn temojn ka zis ioman perdi on en temprioritatoj, krome okazis kronika malfruo en la aperritmo.

Ekde 2002 la gazeto estas redaktata-kompilata de Stano Mar ek en Slovakio.

**Andreas K nzli**



## La kvara Beletra Almanako



La kvara *boao* estas dediĉita al sciencfikcio, fantasto kaj fabeloj. Kiel ponto al la serio *Sferoj*, kiu grave kontribuis al evoluigo de tiu ĝenro en Esperantujo en 1982–2000, rolas recenzo pri la lasta volumo *Sferoj 10*.

Du reaperigoj notindas: *Kosma rubaĵo* de Bernard Golden kaj *Arnim* de István Ertl. Liven Dek, la patro de *Sferoj*, ĉeestas per kvar minirakontoj. Lia prelego *Esperanto, la fantasta lingvo*, prezentita en la itala sciencfikcia kongreso en 1994 estas publikigata sen ĝisdatigo, tiel, ke ĝi servu kiel la bazo por kompilota bibliografio.

Bjørn A. Bojesen esperantigis sian novelon *Kornon kontraŭ krud'*, per kiu li antaŭ jardeko venkis en porjunula konkurso norveglingva. Higinio García en *Rifuzita memuaro* fantazie kunplektas la Tolkienan kaj Esperantan mondojn. Pri aventuroj de la ĉiela infano rakontas Rinko Kubota en *Feliĉo de unu talanto*.

Per la interpreto de Gunnar Gällmo aperas specimeno de la sveda bildstriisto Lars (Lon) Olsson *Fulmotonĉjo. Piedokataklismoj*. Ionel Oneț tradukis el la rumana rakonton de Victor Martin kaj Jorge Camacho poemon de la hispana verkistino Nuria Barrios.

Anna Löwenstein en sia eseo pri Harry Potter esploras la kialojn de la populareco de la libroserio pri la juna magiisto. Laŭ ŝi, la libraro de Rowling bone enkadriĝas en la kategorio de la brita infanliteraturo, nome, lerneajna rakonto, kiu datiĝas de la 19a jarcento. Temas pri la vivo en loĝlernejo.

La recenza fako estas ampleksa. Mao Zifu kaj Michael Cayley recenzas la trivoluman epopeon *La Mastro de l' Ringoj* de Tolkien kaj prian libreton de Korĵenkov. Luiza Carol analizas la jam kvinlibran serion *utopia* de la eldonejo *Bero*. Donald Broadribb donas sian juĝon pri *La mirinda historio de Petro Schlemihl* de Chamisso, Anna Löwenstein pri *Kaj staras tre alte* de Trevor Steele. Jorge Camacho recenzas la libron *Ormuzdo kaj Arimano* de Almqvist, kaj Miguel Fernández *Eklipsas* de Camacho.

Ĉi-foje la specialaj ilustraĵoj por *boao* venas de Leo Ki.

**Halina Gorecka**

## Spegulo. Printempo 2009

Andreas Künzli sian sperton pri kritikado de ekzistaĵoj en la Esperantomovado sistemigis en la redakcia artikolo *Kritiko — ne dankon?!* Li konsultis plurajn elstarajn esperantistojn pri la temo kaj faris certajn konkludojn.

La prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, respondis al demandoj de *Spegulo* pri la organizaĵo mem, pri la Universalaj Kongresoj k.a. La Zamenhofan jubileon omaĝas republikigo de la konata biografio, verkita de lia frato Leono antaŭ cent jaroj kaj poste reeldonita, interalie, de Ludovikito.

Dudekpaĝa eseo de Tomas Venclova *Vilno: la mito pri disiĝo kaj la mito pri kuneco* (tradukis el la angla Tomasz Chmielik) montras la ĉefurbon de Litovio kiel urbon, kiun litovoj, poloj, judoj kaj belorusoj rekonis kiel propran centron de siaj tradicio kaj kulturo.

Pri la rivaleco de Bulgario kaj

Rumanio, sed ne nur, eldiras Gabriel Guirgiu en *La necesa Albanio* (tradukis Ionel Oneț) — laŭ mi, la plej bona teksto en ĉi tiu *Spegulo*.

Ĉi-kajere estas lanĉita *Orienteŭropa enciklopedieto*, kiu pritraktos terminojn kaj nociojn el diversaj kampoj. La unua fenomeno, kiun traktas Andreas Künzli, estas *Vodko*. Li ankaŭ artikolas pri la usona politologo Huntington kaj ties libro *La Kolizio de la Civilizoj*.

Troviĝas ankaŭ fragmento el la baldaŭ aperonta libro *Reguloj de vivo* de Janusz Korczak (tradukis Tomasz Chmielik).

Jerzy O. rakontas pri la usona blusisto Muddy Waters. Mikaelo Bronštejn prezentas kaj interpretas rezultojn de la enketo farita en la jarŝanĝa IF, kies ĉeftemo estis *Literaturo*.

Kurioze, en la fino estas *Antaŭparolo* de Kazimierz Leja.

Legis por vi  
**Halina Gorecka**

## Versoj perversaj al sterka verko

**La Pafklik. Fek al Esperanto: K-Disko. — Don-ville: Vinilkosmo, 2009.**

Ĉi-foja recenzo kruelos beste... Mi repon ne ŝatas, diru honeste. Laŭ mi, sin okupi pri stulto hiphopa maldignas por klera junul' eŭropa. Prefere afrika maŝin' muskola strebu domini en tiu skolo, ol aŭdi la francojn per slang' bandita fanfaroni pri aŭdac' kaj heroeco mita. Do, pagas nun — 'stas mia kulpo, ke agresivas la karno pulpa, ke grumblas voĉ' juna, preskaŭ ina, ja tiu arest' en la jar' dumilkvina kaj sekve longdaŭra enu' prizona okazis pro prova dozo Klingona, kiun mi ŝanĝis je ekvivalento mona (konspire, kiel sovetia spiono) al ĉi naivaj adoleskoj kun rozaj lipoj bubeskaj. Mi tiam sukcese komercis Volapukon en nigra getto kaj ruze tentis junularon al debuta danĝera injekto. Se virgan vejnon pikis aidosa dorno, do pipro subventron fikis en etoso porna. Mi ĉiam aprezis forte drogi kaj lertis diletantojn delogi — bezonis gesklavojn por ĉio pretajn, ja distribuon atribuas narkoreto. Do, tiuj ŝatantoj de bum bum kanabumo, Tokiponon pogrande vendis kaj gajnis solidan monsumon, subite ekrealis koŝmaro malica — iĝis viktimoj de plana provoko polica. En malliberejo plej naturis geja stilo — ĝuste de tiam Platano kun Katakana ekrevis pri pafiloj. Kaj verdan lingvon ili ne plu fumas — blasfemas, se Esperanta cigaredo eklumas.

Ŝajne mi pruvis, ke ĉi-tipa ri(t)mumo facilas — decida mem: kiom sensencas, kiom utilas, des pli ne mankas fama prononco terura, nur francajn orelojn ial neniel tortura. Aldonu la sakrojn amasajn, probable en vian adreson — ĉu sufiĉas kaŭzoj por perdi la intereson?! Tamen tempas demeti prokuroran mantelon — surfeki l' albumon ne havas mi celon.

Malgraŭ la harmonio malfilharmonia, Pafklika destin' — por vasta aŭditorio: eblas danci, amuze fingrojn pozi, kun junino sursofe brakume ripozi. L'uloj viglas, ion modan rakontas — furze tiklas, neniun hontas. Sonpaletro abundas, akuratas bruoj/drumoj/notoj — eĉ Mazi ne gratas kaj Putina anekdoti pri malseka pispoto. Gratule por (mem)ironio restis libera loko — ne nura Tian'An'Men-ajn klaŭnojn el ViTubo primoko.


Ĝenerale, oni kakis aktuale, do normale (ne male) — subtenu produkton del' disk' populara per leda monuj' malavara.

**Glebo Malcev**



# Muzika somero en Esperantujo

Inicialoj DC



Tiuj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al KEF, ankoraŭ povas tion fari ĉe [www.kef.saluton.dk](http://www.kef.saluton.dk). Ja ankoraŭ estas lokoj por partopreni la faman Kulturen Esperanto-Festivalon (KEF), kiu okazos ĉi jare en Danlando kaj Svedio de la 7a ĝis la 12a de julio, tuj post la Roskilde Festivalo, en la urboj Helsinoro kaj Helsinburgo kun spektakloj en ambaŭ urboj kaj eĉ eble sur la maro pramŝipe inter la du havenoj!

La programo estas vere alloga kaj ankaŭ kun multaj surprizoj. Nur por gustumi, jen kelkaj artistoj anoncigitaj dise:

*Hotel Desperado, La Pafklik, Tone, Espo-Despo, Solotronik, Ĵomart-Nataŝa kaj Karina, JoMo, Zhou-Mack, Inicialoj DC, La Perdita Generacio, Kapriol!, Martin & la Talpoj kaj aliaj...*



Sed ne nur muziko. Ankaŭ literaturo, teatro, ludoj, sporto, nokta diskejo, viva karaokeo, kursoj, diversaj atelieroj (danco, muziko, desegno, literatura rondo, poezio, kino, komiksoj, interreto, prelegoj ktp..)

Ĉio tie estos kunigita por etosigi vian partoprenon...

## Festu feste dum FESTO!

Post KEF rezervu vian unuan semajnon de aŭgusto por iri al FESTO.

Por ĉi-jara FESTO la novaĵo estas, ke ĝi de Francio transiras la Rejnjon por iri al Germanio en Zwingenberg. La festivalo komenciĝos la 8an de aŭgusto kaj finiĝos la 15an de aŭgusto. Ĝi disvolviĝos en junulargastejo.

Ankaŭ tie la etoso estos garantiata kun riĉa programo de artistoj diverslandaj kun interalie pro la du brazilaj bandoj... *Supernova* (peza roko) kaj *Tone* (hiphopo). Sed ankaŭ eblas konatiĝi kun la arto de Stefo kaj Sulajka (popfolko) el Germanio, Gjom (piano-kanzono) el Francio, *Kapriol!* (danca popolmuziko en Esperanto) el Frislando/Nederlando, Zuzana (kanzono) el Pollando, *La Pafklik* (hiphopo) el Francio, kaj *Inicialoj DC* (elektra poproko) el Germanio.

FESTO  
2009

En la programo estos ankaŭ ekskursoj, atelieroj, ludoj, kino, karaokeo, diskejo kaj plej diversaj aktivaĵoj atendos vin dum tage kaj nokte postkoncerte...

Aliĝu tuj al FESTO ĉe <http://esperanto-jeunes.org> antaŭ ol ne plu estos lokoj...

## MP3-Servo preskaŭ preta!

Jen granda novaĵo por la somero, kiu kontentigos certe vian muzikemon... Tre baldaŭ aperos la nova retejo (MP3-Servo), kiun *Vinilkosmo* starigos por ebligi aĉeton de la Esperanto-muzikoj per elŝutado el la reto.

Unue, en la retejo estos albumoj, eldonitaj de *Vinilkosmo*, sed poste aldoniĝos iom post iom la tuta katalogo. Eĉ pli multe, ĉar artistoj, kiuj preparas novajn muzikojn, planas tie aperigi ilin (Alejandro Cossavella, *Kapriol!* kaj baldaŭ pliaj).

La retejo ekfunkcios komence de junio ĉe [www.vinilkosmo-mp3.com](http://www.vinilkosmo-mp3.com), kaj certe vi aŭdos pri ĝi... Tiam ne maltrafu ĝin kaj nepre provu ĝin!

Dume funkcias kaj funkcios la reta diskoservo ĉe [www.vinilkosmo.com](http://www.vinilkosmo.com).

Muzikume via

**Flo!**



Tone

HIP-HOP  
100% EN  
ESPERANTO



# Serpentoj en la puto

*Serpentoj en la puto* estas la titolo de la plej nova romano de la hungara Esperanto-verkisto István Nemere. Ĝi estas moderna romano pri la terorismo, rilatanta al Al-Kaida.

La historio okazas en nuntempa okcidenteŭropa grandurbo nenomita, kie la islamaj teroristoj provas prepari grandan atencon. Ni ekscias, kiamaniere la teroristoj instruas kaj ideologie, psiĥologie efikas al la adeptoj, por ke ili eksplodigu sin mem. Sed la policistoj estas same fanatikaj, kiel la teroristoj, kaj en ĉi tiu milito neniu timas riski sian vivon.

Samtempe vivas en la urbo aliaj araboj. Unu el ili estas studento Omar Hamdi. Omar hazarde renkontiĝas kun Isabel, kiu, tute neatendite, estas... Sed ĉi tie komenciĝas la romano mem. Romano atentostreĉa, en kiu eĉ sur la lastaj paĝoj okazos surprizoj.

Oni povas eklegi la romanon nun, kelkajn monatojn antaŭ la planata eldono. La aŭtoro kaj la eldonejo *Sezonoj* decidis iom post iom enretigi pli ol trionon de la romano kaj tiel pretigi la lanĉon de la libro en la 94a Universala Kongreso ĉi-julie en Bjalistoko. La daŭrigoj aperos ĉiun duan semajnon. Jam per tri apartaj fragmentoj estas enretigita la tuta unua ĉapitro. Ĝi legeblas en la retejo de *La Ondo / Sezonoj*: <http://esperanto.org/Ondo/Beletro/>



Halina Gorecka

## Ricevitaj libroj

*El ombro*: Antologio de prozo el Rusio / Komp., antaŭpar. Grigorij Arosev, Nikolaj Gudskov. — M.: Impeto; REU, 2008. — 100 p.; 300 ekz. — [Donaco de Svetlana Smetanina].

*Esperanto kunligas nin*: [Artikolaro] / Antaŭpar. Chen Haosu. — Pekino: Ĉina Fremdlingva Eldonejo, 2008. — 223 p., il.

Korĵenkov, Aleksander. *Unu Ringo ilin regas*: John Ronald Reuel Tolkien en Esperanto: Prelegoteksto. — Kaliningrado: Sezonoj, 2008. — 16 p.; 300 ekz. — (Serio *Sed ne el katedro*; №4). — [Donaco de *Sezonoj*].

*Oraj kantoj por RET-07* / Komp. Garik Kokolija. — [M.]: [G.Kokolija], 2007. — 48 p. — [Aĉeto].

van Dijk, Ziko. *La Asocio*: Skizoj kaj studoj pri la historio de UEA. — Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2008. — 301 p., il.

Бронштейн, Моисей Цалевич. *Десть дней капитана Постникова* / Пер. с эсп. Анатолия Радаева. — М.: Импэто, 2007. — 368 с., илл.; 500 экз. — [Aĉeto].

Буркина, Оксана Викторовна. *Произносительная норма в эсперанто*: Автореферат на соискание учёной степени кандидата филологических наук. — СПб.: Санкт-Петербургский государственный университет, 2009. — 27 с., 130 экз. — [Donaco de la aŭtoro].

## Ricevitaj gazetoj

Beletra Almanako, 2009/4; Dia Regno, 2009/2; EAB Update, 2009/45; Esperanta Finnlando, 2009/2; Esperanto aktuell, 2009/2; Esperanto en Danio, 2009/2; Esperanto sub la Suda Kruco, 2009/1; Esperanto, 2009/3,4; Femina, 2009/17; Frateco, 2009/83; Ĝenerala Informilo, 2009/154,155; Heroldo de Esperanto, 2009/3,4,5; Informilo por Interlingvistoj, 2009/2; Internaciisto, 2009/1; Juna Amiko, 2009/1; KAE-Infomilo, 2009/66; Komencanto, 2008/6, 2009/1; La Brita Esperantisto, 2009/966; La Gazeto, 2009/142; La Merkato, 2009/97; La Movado, 2009/697,698; La Ondo de Esperanto, 2009/4; La Revuo Orienta, 2009/2,3; La Sago, 2009/53; Literatura Foiro, 2009/238; Litova Stelo, 2009/1; Monato, 2009/3,4,5; Norvega Esperantisto, 2009/2,3; Okazas, 2009/568-569; Pola Esperantisto, 2009/1; REGo, 2009/2; Scienco kaj Kulturo, 2009/2; Scottish Esperanto Bulletin, 2009/1; Sennaciulo, 2009/3-4; Svisa Esperanto-Societo Informas, 2009/2; Tempo, 2009/102; Usona Esperantisto, 2009/2; Verda Saksofono, 2009/23.

## Gazetoj

*Literatura Foiro*, 2009, №238

Al la poezia arto estas grandparte dediĉita la aprila numero 238 de *Literatura Foiro*. Du originalaj poemoj de Benito Filipo; Ŝimun Ŝito Ĉorić en traduko de Zora Heide; Fabrizio De André tra la rigardo de Giorgio Silfer; *Brazila Esperanta Parnaso* sub la kritika opinio de Donald Broadribb; Márton Fejes pri hungarlingva revolucia poemo de Julio Baghy; premiere porinfanaj rimenigmoj de Elena Popova.

Ne nur tion pri literaturo proponas la revuo, kiu prospere eniris sian 40an jar-kolekton: jen eseo de Ŝimun Ŝito Ĉorić pri la verkistoj en diasporoj, jen recenzo de Marie-France Conde Rey pri la originala romano *Dek tagoj de kapitano Postnikov* de Mikaelo Bronŝtejn.

Daŭras la speciala rubriko pri la Zamenhof-jubileo: eseo de Carmel Mallia pri la *Majstro, la estetikulo*. Pri la jubileo kolorajn kovrilojn desegnis la meksika pentristino Leonora Gonzalez.

Planlingvistiko trovas atenton: Walter Ŝelazny vaste analizas la enciklopedion pri la universalaj lingvoj en Svislando, kompilitan de Andy Künzli, el metodologia vidpunkto; Juan Negrete serĉas respondon al la demando, ĉu la muzika lingvo Solresol estas parolebla.

En la aprila *LF* abundas informoj pri la kultura vivo en Esperantio dum la printempo: la verkistina ateliero de FEM kaj KCE, la inaŭguro de la Esperanta Panteono, la asembleoj de LF-koop kaj de la Esperanta PEN-Centro; pri okazontaj dum la somero esperantologiaj eventoj. Valdas Banaitis kaj la geaktorj de Bulgara Esperanta-Teatro komentarias pri antaŭaj numeroj de *Literatura Foiro*.

HeKo

## La duobla Ondo

Kiel ni avertis en la aprila redakcia kolumno ĉi tiu Ondo estas duobla. La sekva kajero aperos post unu monato. La partoprenantoj de FREŜO ricevos ĝin en Olsztyn la 26an de junio.

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero) ISSN 0299-6987

# LA GAZETO

**MONDKULTURA  
SENDEPENDA  
ESPERANTISMA**

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO  
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

gazeto@aol.com http://www.lagazeto.com

Por la marta krucvortenigmo *Flaŭro* venis 23 respondoj, ĉiuj tute ĝustaj! Ni publikigas unu solvon, la alia eblas per interŝanĝo de la vortoj “kotono” kaj “kokoso”.

La ĝustan solvon sendis: Karine Arakeljan (Armenio), Charles Dornan, Anne George, Malcolm Jones (Britio), Milan Smělý (Ĉeĥio), Erkki Kemppainen, Bruno Lehtinen, Raita kaj Matti Pyhälä, Aira kaj Erkki Röntynen (Finnlando), Jackie Huberdeau, Anne Jausions, Louise Marin (Francio), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), Ester Olsen (Norvegio), Dorota Burchardt, Janina Dęga, Mirosława Kubicka, Hanna Skalska, Zbigniew Tytkowski (Pollando), Jurij Kivajev, Svetlana Konjašova, Oleg Vasiljev (Ruslando), Roland Larsson (Svedio).

La loto donis premion al *Raita* kaj *Matti Pyhälä*. Ni gratulas ilin!

E	A	P	A	P	R	I	K	O
A	V	E	N	O	B	U	A	
O	T	V	I	N	B	E	R	O
E	N	D	I	V	I	O	U	V
I	A	O			S	T	I	P'
A	M	A	R	I	L	I	D	O
O	O	E	E	F	K			
A	F	A	G	R	O	P	I	R
K	A	R	I	K	O	D	L	T
E	A	T	L	A	R	I	K	O
N	I	M	F	E	O	R	K	N
O	B'	O	K	O	K	O	S	O

## Sudoku

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampon per nombroj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en la kvadratoj 3×3 la nombroj ne ripetiĝu.

La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ 1 aŭg 2009.

Komputile kompilis **Aleksej Korĵenkov**

7	9		5		1			
	5	1						6
	8				9			2
			2	5			8	1
8	4			7	3			
1			6				7	
5						8	1	
			3		2		6	5

## Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

*el la kolekto de reduktoro*

### Ameriko... per heliko?

Inter liaj verkoj troviĝas ankaŭ la unua helplibro pri navigado el la jaro 1464 titolita “De navigatione”, skribita tri jarcentojn pli frue ol estis malkovrita Ameriko. (Radenko Milošević. *Monumento al Benedikt Kotruljević // Zagreba Esperantisto*, 2007, №3, p. 68)

### Prefero: kio ajn, aŭ: La movado en fluo

[nia movado] ... devas resti movadeca movado, en la senco ke ĝi plu opinias sin speco de [...] laksa reto aŭ kio ajn... (José Antonio Vergara, 29 mar 2009, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/4345>)

### Eternaj flamoj

Ni estingas fajron ekde 1930. (Reklamo de *Pastor Group*, produktanto de fajroestingiloj, *Zagreba Esperantisto*, 2007, №1, dorskovrilo)

### Profeto de pasinteco

La retbulteno fakte apartenis al LF-koop, kiu la 2an de junio 2001 donacos ĝin al la Esperanta Civito.

(HeKo 385 5-C, 25 mar 2009, <http://www.esperantio.net/index.php?id=825>)

### Titolo el la libroserbo

Meditado de ordinara bovlo serba

(titolo el la traduka bibliografio de Petar Stefanović, en *Esperantistoj en Serbio*, Beogrado, 2006, p. 266; rimarkis Ionel Oneț)

### Kunvenoj ne nur la 35an de majo, aŭ: Eĥoŝanĝo ĉiŝaŭde

Kunvenoj de la klubo nuntempe okazas en la unua merkredo de ĉiu ĵaŭdo en la loĝejo de gesinjoroj Molnár. (László Szilvási, 3 mar 2009, <http://groups.yahoo.com/group/esp-en-hung/message/16009>)

### Aboli SATon, aboli katon?

... se SAT efektive mortus, ĝia bedaŭrinda paradigmo estus grandparte aplikebla por priskribe prognozi la fatalan katabolon de aliaj supernaciaj asocioj... (HeKo 384 2-A, 5 mar 2009, <http://www.esperantio.net/index.php?id=812>)

### Senkonsidere al stilaĵ konsideroj

Mi tute ne spertas pri retejoj, sed konsideras konsiderinda la proponon de Slavik. (“Propono de Slavik pretervidata”, komento de Ferriol Macip al “Klaku.net faris sian lastan klakon”, 14 feb 2009, <http://www.liberafolio.org/2009/eksklaku/#1234595551>)

### Beletra frandraĵo

Ĝus aperis ĉe Frandra Esperanto-Ligo *Morto de Artisto*, nova originala romano de Anna Löwenstein. (<http://www.esperanto.be/fel>, stato 20 maj 2009; atentigis Ionel Oneț)

Plukis **István Ertl**

### Juda humuro

## Longa vivo

Du judoj renkontiĝas.

*Berl*: Mi legis ke en Eŭropo la virinoj vivas pli longe ol la viroj.

*Ŝeps*: Ĝuste! Precipe la vidvinoj.

El la kolekto de **Josi Shemer**



## Kio estas “Esperanto-Jovens”?

18–19 apr okazis en Natal (ŝtato Rio Grande do Norte) la renkontiĝo *Esperanto-Jovens* kun 31 gejunuloj el diversaj ŝtatoj de Brazilo.

La ĉeftemo “Junularo en la disvastigado de Esperanto” estis sufiĉe bone debatita laŭ la subtemoj: Kiel nun disvastiĝas Esperanto? Kio mankas nun por bona disvastiĝo? Kiujn mitojn eviti kaj kion elstarigi? Informmaterialo: celpubliko kaj enhavo. Kiel disvastiĝi en interreto?; Kien sendi interesatojn? Krome prezentiĝis la filmoj *Esperanto estas...* kaj *Esperanto, respekto en ĉiuj lingvoj*. En la fermo oni listigis la konkludojn kaj aprobis la dokumenton *Peticio al la Movado*.

La organizintoj kaj ĉiuj partoprenintoj, ĝojaj pro la vera sukceso de la evento, konsideras ĝin la unuaj paŝoj por “alproksimiĝo kaj interamikiĝo de gejunuloj en la nord-orienta Brazilo, cele al konstanta kunlaborado inter grupoj, plijunigo kaj ĉefe prospero de nia regiona movado”. La dua renkontiĝo okazos post unu jaro en Fortalezo.

**Ivaldo Alves de Souza**

## Petras Čeliaskas jubileas!

La 19an de aprilo en la sidejo de la Litova Esperanto-Asocio en Kaŭno pli ol 50 esperantistoj kunvenis okaze de la 80a naskiĝdatreveno de la eminenta litova esperantisto Petras Čeliaskas — tradukanto, redaktoro, publicisto, preleganto...

La multajn ricevitajn gratulojn kaj donacojn (ankaŭ de svedaj esperantistoj, kiuj tiumtempe gastis en Litovio) la jubileanto respondis per dankparolado kaj prezentis sian plej novan libron *El mia Esperanta skatolo*, eldonita okaze de la jubileo. Ĝi estas la 15a libro de Čeliaskas en/pri Esperanto, kaj la plej ampleksa (520-paĝa) el ili.

*El mia Esperanta skatolo* estas donaco de Litova Esperanto-Asocio al la jubileanto kaj samtempe lia donaco al ĉiuj esperantistoj. La kunvenintoj povis akiri la novan libron kaj ricevi dediĉon de la aŭtoro. La kunvenon kronis festeno ĉe komuna tablo kun manĝetaĵoj kaj drinkaĵoj.

Petras Čeliaskas daŭrigas sian laboron pri granda litova-Esperanta vortaro, enciklopedio de la litova Esperantomovado kaj gramatiko de Esperanto por litovlingvanoj.

**Povilas Jegorovas**

*La Ondo* plezure aldonas sian voĉon al la ĥoro de la gratulantoj kaj deziras al nia amiko Petras multajn jarojn da vivo kaj realigon de liaj kreaĵoj!

## Kunkonstrui monumenton

La franca entreprenisto kaj esperantisto Michel Basso volas donaci al la Esperanto-urbo Herzberg am Harz grandan monumenton *Espero* kun terĝlobo (el betono).

Li kaj ni petas vin: bonvolu sendi al ni ŝtoneton (grandeco inter olivo ĝis kokina ovo) kun priskribo pri la deveno, loko, speco de la ŝtoneto. La konstruisto bezonas ŝtonetojn el la tuta mondo por konstrui belan betonkruston el Esperanto-solidareĉtonoj. Bonvolu tuj eksendi, ĉar la afero estas vere urĝa. Unika esperanta mondsolidareco pruvu, ke Esperanto vivas.

Se vi partoprenos la Eŭropan Esperanto-Kongreson ĉi-somere en Herzberg am Harz, vi povos kunporti la ŝtonetojn kaj persone transdoni ilin al samideano Michel Basso.

**Petro Zilvar, Zsófia Kóródy**



**Ruslando.** Pli ol dudek lingvoj estis prezentitaj 28 mar 2009 en Uljanovsk kadre de la sepa Lingva Festivalo. Eksterlandaj studentoj el la loka universitato rakontis pri siaj naciaj lingvoj, kutimoj, manĝaĵoj, montris dancojn kaj kantojn. Sur la foto: prezento de la mordva lingvo. (Jurij Karcev)



**Ĉinio.** 19 apr dudeko da divers-aĝaj pekinaj esperantistoj akvumis arbojn en la Esperanto-Bosko en la parko Chaoyang. La Esperanto-Bosko estis establita en la 89a UK en 2004. Post la akvumado la esperantistoj fotis sin antaŭ la ŝtonego kun la vortoj “Esperanto-Bosko”. (Li Jianhua / de Chi Tienan)



**Portugaliao.** 6–8 marto en Oporto okazis *Duria Plonĝado*, la 5a Ibera Renkontiĝo. Kvaroncento da partoprenantoj povis ne nur viziti belan urbon sed ankaŭ babilu, diskuti, lerni, spekti filmojn kaj amuziĝi Esperante. Sur la foto estas kelkaj partoprenantoj tostantaj per Oporta Vino. (Roger kaj Xana / Paulo Branco)






Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*  
 Serio Mondliteraturo, Volumo 16  
 200 paĝoj, 18 eŭroj



Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*  
 Serio Mondliteraturo, Volumo 15  
 208 paĝoj, 20 eŭroj



J.R.R. Tolkien. *La hobito, aŭ tien kaj reen*  
 Serio Mondliteraturo, Volumo 9  
 224 paĝoj, 18 eŭroj



Georges Simenon. *La flava hundo.*  
 Serio Mondliteraturo, Volumo 14  
 120 paĝoj, 12 eŭroj.